
aprilo 1973
66-a jaro
n-ro 808 (4)

esperanto

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — rotterdam-3002 — nederlando

ATENO



INVITAS

Vi trovos

sur la apuda paĝo ĉefartikolon kontribuitan de la prezidanto de TEJO, d-ro Renato Corsetti. D-ro Corsetti argumentas, ke la pozicion de la Esperanto-movado ni mem malfortigas per ofte nesufiĉa scio kaj kompreno pri ĝia valoro — do kvazaŭ pro ia komplekso de malplivaloro. Efektive, tro ofte okazas, ke ni defendas Esperanton kontraŭ kritikantoj, kvazaŭ ĝi ankoraŭ estus nura projekto ĵus publikigita, anstataŭ matura lingvo elprovita kaj enradikiĝinta dum pli ol 80 jaroj. Se iu akuzas, ke tiu aŭ alia lingva aspekto de Esperanto (ekzemple la refleksivo) estas tro malfacila aŭ iel netaŭga, tro ofte oni komencas klarigadi, pardonpeti, kompari, analizi, senkulpiĝi . . . anstataŭ simple rideti kaj respondi, ke tamen ĝi funkcias kontentige por centoj da miloj da homoj el ĉiaj nacioj.

Enhavo

61 La psikologia stato de la nuntempa movado (Corsetti)
62 Homaj rajtoj en la jaro 1973:
Deklaracio travivinta kvaronjarcenton
Lingva diskriminacio — laŭleĝa en Britujo
62 Alelektoj al la Akademio de Esperanto
63 Havajo: 9 000 infanoj lernas Esperanton
63 Aerakcidento: ankaŭ lingvo rolis
64 Impresoj el Latin-Ameriko (Neergaard)
67 Por pli efika informado (Lapénna):
13. Interligiteco kaj celo
14. Ekzemploj de BEA kaj Walla Walla
69 Loke - Fake - Persone (mallongaj novaĵoj)
71 Recenzoj
72 SUK-asocio
72 Laste aperis (novaj eldonaĵoj)
73 Informejo (Vi demandas — Ni respondas)
73 Leteroj de legantoj
73 Kiu ŝi estas?
74 Kongresi unue en Jugoslavio kaj poste en Grekujo
76 TEJO-paĝo (IJK)
77 Komenco bona — ĉio bona
78 Esperanto en radio
79 Oficiala informilo n-ro 466
80 Anoncetoj

La kovrilo

Ni ne garantias, ke vi renkontos en Ateno mem ĉi tiun invitan Afroditon. Ŝi devenas el la insulo Rodiso kaj el la 3a jarcento antaŭ Kristo. Sed vi ja trovos en la kadro de la Postkongreso (vidu la paĝojn 74-75) multajn belaĵojn el la helena epoko. Nur unu konsilon; aliĝu baldaŭ!

esperanto, aprilo 1973

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.
Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1882-1910).
Ĉefredaktoro: V. Sadler.
Redaktorino: A. Woessink-Nagata.
Inkluzivas la organon de TEJO "La Juna Vivo" (TEJO-paĝo).
Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Abonprezo por unu kalendara jaro: 22,50 gld. (kun membreco kaj Jarlibro: 30,— gld.). Unuopa ekzemplero: 2,— gld. Por jara aerpoŝto aldonu: Oceanio 16,50; Sudameriko 13,75; Suda Afriko, Azio 11,—; Mezafriko, Norda kaj Meza Ameriko 8,25; Mezoriento, Nordafriko 5,50 gld.
Anonc-tarifo: 1 p. 375 gld., 1/2 p. 200 gld., 1/4 p. 110 gld., 1/8 p. 65 gld., 1/16 p. 40 gld. Ripet-rabato 20%.
Banko: Bank Mees & Hope, Cool-Singel 93, Rotterdam, Nederlando.
Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).
Telefono: (010) 36 15 39.
Telegramadreso:
ESPERANTO ROTTERDAM.
Kompostita kaj fotografita en la Centra Oficejo de UEA.
Presita ĉe Grafika Entrepreno Tuijtel en Hardinxveld, Nederlando.
Legantoj en 88 landoj.

estraro de uea

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj: Prof. d-ro Ivo Lapenna, 77 Grasmere Ave., Wembley, Mddx, HA9 8TF, Britujo.
Vic-prezidanto kaj estrarano pri turismo kaj aŭtomobilismo: E. Carlén, Yxhult, S-692 02 Kumla 2, Svedujo.
Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado, delegita reto, junularo kaj diskonigo de la agado de UEA: G. Becker, D-6653 Blieskastel, Alter Hangarten 2, F.R.Germanujo.
Estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj kaj pri organiza plifortigo: D-ro W. Bormann, D-205 Hamburg 80, Schärstr. 26, F.R.Germanujo.
Estrarano pri kulturaj aferoj: J. Uśpieński, Warszawa-12, Poŝtkesto 100, Pollando.
Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: D-ro J.C. Wells, 17 Ashbourne Terrace, London SW19 1QX, Britujo.
Estrarano pri financo: E.J. Woessink, Onder de Beumkes 29, Velp (Gld.), Nederlando.

La psikologia stato de la nuntempa movado



Por eviti konfuzojn kaj neĝustajn ĝeneraligojn, mi diru tuj, ke la ĉi tie priparolita situacio rilatas nur al la stato de la movado en Okcidenta Eŭropo. Pri aliaj mondpartoj mi tre ŝatus legi analizojn de tieaj esperantistoj.

Nu, laŭ mi unu el la ĉefaj karakterizaĵoj de la meza okcidenteŭropa esperantisto estas la dubo, kiun li mem havas, pri la valoro de Esperanto.

Dum mi skribas ĉi tiujn liniojn, mi jam aŭdas la riproĉajn voĉojn de multaj bonaj legantoj, kiuj akre neas la ĉi-supran aserton. Sed ilia neado estas laŭ mi nur sintrompa.

Fakte certeco pri la valoro de Esperanto manifestiĝus en kuraĝo alfronti la neesperantistojn kaj fieri antaŭ ili pri la internacilingva movado kaj ties atingaĵoj. Kontraŭe ni ĉiuj konas la mezan esperantiston, kiu tre zorge kaŝas sian esperantistecon antaŭ labor-kolegoj, superuloj, eĉ parencoj, se eble.

Ni ĉiuj konas la etoson, kiu regas en multaj lokaj kluboj, kie oni zorge klopodas eviti partoprenon de neesperantistoj, "ĉar nia sidejo ne estas inda por ili", "ĉar nia programo ne estas kulture tiel valora" ktp.

Ne estas malfacile malkovri la kialojn de tia sinteno.

Oni ĉi tie vivas en medio, kie multaj ignoras Esperanton aŭ rigardas ĝin kun malestima rideto.

Nu, estas nature, ke post kelkaj malestimaj ridetoj oni ne plu volas ricevi aliajn tiajn kompatajn reagojn, kaj oni tute simple klopodas eviti la konfrontiĝon kun neesperantistoj. Sed tiam ekfunkcias la diabla cirklo, kaj, ju pli oni fermiĝas en sia medio, des pli la movado iĝas sekteca kaj des pli da kompataj ridetoj ĝi ricevas (kaj meritas).

Kompreneble ĉie troviĝas elstaraj batalantoj por Esperanto, kiuj sentime alfrontas la ĉirkaŭantan socion, sed ĉi tiuj rimarkoj, evidente, ne koncernas tiun eliton.

Do, se oni lasas sin senkuraĝigi de la reago de neesperantistoj, ĉu tio ĉi ne signifas, ke oni ne estas ene plene konvinkita pri la valoro de Esperanto?

Kaj kiam oni ekiras al milito kun la konvinko, ke la malamiko estas supera, la malvenko estas certa.

Kion fari?

Ni klopodu respondi ĉi tiun demandon.

1-e Necesas sin konvinki per solidaj argumentoj, ke Esperanto estas valoraĵo. Tio ĉi ne estas malfacila, sed oni devas pristudi la fenomenon "internacia lingvo" el la teoria kaj el la praktika vidpunkto. Ne sufiĉas lerneti la lingvon kaj poste ĝin pli malpli bone utiligi por turismumi aŭ kolekti alumetetikedojn, se oni volas iĝi vera por-Esperanta aganto, kaj ne simpla uzanto de la lingvo kaj profitanto de la servoj de la movado.

Pri la teoriaj aspektoj de la movado ekzistas multaj bonaj studoj. Por havi ideon pri la nuntempaj praktikaj atingoj mi povas konsili nenion alian ol atente legi plurajn revuojn kaj havigi al si la interesajn materialojn.

2-e Necesas ataki la eksteran socion ne fanatike sed tamen firme, per argumentoj science bazitaj kaj per valoraj faktoj, ne per deklaroj pri homarama amikeco kaj pri la "beleco" de unu sola tuthomara lingvo.

Kiam, ekzemple, universitata profesoro diras al vi, ke "ĉi tiu via Esperanto estas ludilo de kelkaj nefakuloj", ne superŝutu lin per kelkhora parolado pri la reguleco de la Esperanto-gramatiko, spicita per citaĵoj pri tio, kion diris Tolstoj aŭ kelkaj papoj, simple donacu al li ekzempleron de *La Monda Lingvo-Problemo*, aŭ minimume reklamilon pri tiu revuo.

Kiam junulo diras al vi, ke Esperanto ne estas tro revolucia afero, ne klopodu konvinki lin, ke homamo estas pli bona ol revolucio; simple donu al li iun ekzemplon el la abunda revolucia literaturo en Esperanto.

Konklude

Ni estas batalanta movado. Ni batalas per ridinde malmultaj rimedoj kontraŭ grandaj ŝtataj aparatoj, kiuj per multe, vere multe, da mono altrudas siajn lingvojn al homoj, kiuj cetere estas jam pretaj akcepti tiujn lingvojn, ĉar ili estas psikologie jam "manipulataj".

Nia nura forto kuŝas en la justeco de nia solvo, kiu ĝuste pro sia justeco antaŭeniras paŝo post paŝo.

Por ĝismaksimume ekspluati tiun forton, unue ni mem devas konvinkiĝi pri ĝi, poste ni devas mobilizi la plej progresemajn tavolojn de nia socio ĉirkaŭ tiu justeco.

Por mobilizi tiujn progresemajn fortojn ni devas unue per lerta analizo de la sociaj tavoloj ĉirkaŭantaj nin distingi progresemulojn de malprogresemuloj kaj poste klopodi alianciĝi kun la unuaj.

Al ĉi tiuj ni montru la progreseman vizaĝon de Esperanto, ĝian socipolitikan signifon, kiu konsistigas la kernon de ĝia forto.

Se ni mem estas konvinkitaj pri la socipolitika potencialo de Esperanto, facile ni povos ŝanĝi nian sintenon al la ekstera mondo, facile ni povos fieri pri nia movado, malgraŭ malbelaj klubsidejoj kaj similaĵoj, facile ni povos diri al "kleraj" lingvistoj, ke ili, okupiĝante pri "dualo en la asiridaj lingvoj de la tria jarcento", restos en sia "ebura turo" sen kontakto kun la praktikaj nuntempaj lingvaj fenomenoj kaj ties sociaj sekvoj.

Ni ataku la mondon, kaj la mondo kapitulacos, ĉar niaj malamikoj (antaŭjuĝoj, neinformiteco, lingva imperiismo) estas ja paperaj tigroj.

HOMAJ RAJTOJ EN LA JARO 1973



LA UNIVERSALA DEKLARACIO PRI HOMAJ RAJTOJ estas jam 25-jara. Tamen malmultaj konas ĝian esencan enhavon, kaj ĝia jura efektivigo tra la mondo ankoraŭ rampas testude antaŭen. Precipe neglektataj estas la lingvaj rajtoj, kiel montras la ĉi-apuda novaĵo el Britujo . . .

Deklaracio travivinta kvaron-jarcenton

Unuiĝintaj Nacioj nun preparas soleni la 25an datrevenon (la 10an tagon de decembro) de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj.

La Deklaracio akceptita unuanime en la 3a Ĝenerala Asembleo de UN en la jaro 1948, ĝenerale dirite, nocie jam multe radikiĝis en la socia konceptado de unuopaj personoj dum sia ekzistado de kvaron-jarcento.

Malgraŭ tio, restas por ni aparte gravaj du aspektoj. Unue, ke multaj nacioj ankoraŭ ne havas tradukon de la Deklaracio en sia nacia lingvo. Due, ke la daŭra malobservado de la lingva punkto en la artikolo 2* ne estas klare konsciata de eĉ kleraj homoj.

La solenado de la datreveno estas denove bona ŝanco por diskutigo pri lingvaj rajtoj kaj pri la rolo de la Internacia Lingvo.

---

* Artikolo 2: "Ĉiuj rajtoj kaj liberecoj difinitaj en tiu ĉi Deklaracio validas same por ĉiuj homoj, sen kia ajn diferencigo, ĉu laŭ raso, haŭtkoloro, sekso, lingvo, religio, politika aŭ alia opinio, nacia aŭ socia deveno, posedaĵoj, naskiĝo aŭ alia stato ..."
(La Esperanta traduko de "Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj" estas senpage mendebla ĉe la Centra Oficejo kontraŭ la nura kosto de afranko.)

Lingva diskriminacio – laŭleĝa en Britujo

Brita kortumo lastatempe verdiktis, ke trinkejestro, kiu postulis ke du azianoj forlasu la trinkejon pro tio, ke ili ne parolas angle, ne ofendis kontraŭ la leĝo de 1968 kontraŭ rasa diskriminacio. La leĝo malpermesas diskriminacion surbaze de haŭtkoloro, raso, nacia aŭ etna deveno, sed ĝi ne ampleksas la lingvan aspekton.

Tiu decido, kiu rezultis el plendo direktita al la Departemento pri Interrasaj Rilatoj, kaŭzis sufiĉe da embaraso kaj estis vaste raportita en la radio kaj gazetaro. La Departemento deklaris, ke tiu decido ne estu rigardata kiel precedenco aŭ kiel truo en la leĝo. Departementa funkciulo diris: "Ni devas certigi, ke protesto pro tia kaŭzo ne estas efektive preteksto por diskriminacio bazita sur haŭtkoloro aŭ raso. Ĉi tio ne povas esti uzata kiel mantelo por kaŝi aliajn formojn de diskriminacio."

Reprezentanto de la Brita Turisma Aŭtoritato deklaris, ke ĝi certe bedaŭrus, se turistoj el eksterlando devus suferi pro nescio de la angla lingvo. Efektive, se la sinteno de la trinkejestro fariĝus ĝenerala, tio signifus grandan baton al la turismo en Britujo. Se la parlamento opinius tion necesa, ĝi povus amendi la leĝon de 1968 tiel, ke ĝi malpermesu ankaŭ lingvan diskriminacion.

ALELEKTOJ AL LA AKADEMIO DE ESPERANTO

5 personoj estis elektitaj kiel akademianoj je la dato 1973-03-05:

Donald Broadribb (Svislando)
Alberto Fernandez (Belgujo)
Edwin de Kock (Sud-Afriko)
Carlo Minnaja (Italujo)
Karel Pič (Ĉeĥoslovakujo)

HAVAJO: 9000 INFANOJ LERNAS ESPERANTON

En Havajo, konekse kun la novigema programo de anglalingva instruado, kiun la Ŝtata Eduka Administrado antaŭ nelonge ree subtenis, Esperanto estas instruata aktuale al proksimume 9 000 (t.e. 60%) el la lernantoj de la sesa jaro en ĉiuj publikaj elementaj lernejoj en la ŝtato. Ĉiu studprogramo pri komunikado daŭras 20-ĝis-25 tagojn, kaj la lecionoj okazas po 5 fojoj ĉiusemajne.

Enkonduke al la temo la instruisto pritraktas la lingvan diversecon en la mondo por stimuli la demandon fare de la lernantoj: Kial ne lernas ĉiuj homoj la saman lingvon, por ke ni povu kompreni unuj la aliajn?

Sekvas skizo pri la ellaborado de Esperanto kaj klarigo pri ĝia celo kiel facile lernebla internacia lingvo por faciligi interkomunikadon tra la mondo.

Per komparo inter Esperanto kaj la angla lingvo la lernantoj sciiĝas, kiujn elementojn ĉiu lingvo devas posedi por esti bona komunikilo. Uzante ĉi tiujn kriteriojn, la lernantoj provas inventi siajn proprajn lingvojn.

Instru-helpiloj uzataj en ĉi tiu studprogramo inkludas kartoludojn, filmstriojn, kasetbendojn kaj librojn kiel *Esperanto por infanoj, Zamenhof — Creator of Esperanto, Bonvolu esti mia amiko, International Language for Scouts* kaj vortaroj.


AERAKCIDENTO — ANKAŬ LINGVO ROLIS

Ankaŭ la lingva problemo ludis rolon en la grava aviadil-akcidento super Francujo en la komenco de marto. Laŭ francaj gazetoj, la komandanto de la aviadilo Coronado plendis pri nesufiĉa lingvoscio ĉe la francaj militistaj trafikregantoj, kiuj plenumis la funkciojn de la strikantaj civilaj regantoj.

Alveninte en Madrid post la akcidento, la komandanto, kapitano Antonio Arenas, asertis, ke la trafikregantoj, kun kiuj li havis radio-kontakton en la minutoj tuj antaŭ la akcidento, ne bone komprenis liajn mesaĝojn. Li diris: "Ili parolis tre malbone la anglan kaj ne konis la kutimajn kodvortojn uzatajn inter la pilotoj de civilaj aviadiloj kaj la trafikoturoj".

Tuj post la kolizio la komandanto sepfoje elsendis SOS-signalon sed ricevis neniun respondon de iu ajn franca trafikturo.

En la akcidento, kiam kuntuŝiĝis du hispanaj aviadiloj flugantaj super Francujo, pereis 68 pasaĝeroj kaj aerlinianoj.



LA FRAKASITA KADAVRO de aviadilo DC-9 de la aerlinio Iberia alteriĝis en vitejo en la eta vilaĝo La Planche en Bretonujo (Francujo) post enaera kolizio kun ĉartita flugmaŝino Convair komence de marto. Pereis 68 personoj. La alia aviadilo alteriĝis sekure malgraŭ la perdo de unu alopinto. Laŭ ĝia piloto, lingvaj malfacilaĵoj kontribuis al la katastrofo. La samaj obstakloj eble ludis rolon en dek unu aliaj preskaŭ-akcidentoj super la teritorio de Francujo, kiujn pilotoj raportis en la daŭro de nuraj kvar tagoj.

IMPRESOJ EL LATIN-AMERIKO


Visita Uruguay el exp
danés Dr. Paul Neerga
Visita nuestro país el Dr. Paul Neergaard, destacado especialista danés, comisionado por el gobierno de su país para conferir en acuerdo con las
establecimiento de laboratorios especializados en cada país, dentro del plan de colaboración bilateral. Se evitaría con ello, dijo el Dr. Neergaard, que el mundo, cada vez más necesitado de alimentos, se viera enfrentado a una
catástrofe como la que India en 1942-1943, en enfermedades de las p sequía, se dio el triste de una carencia absoluta mentos que provocó la mu casi un millón y medio d soyas.
El distinguido visitante exp también su sentimiento de que, poseyendo el idioma español, viera que expresarse en los curs proyectados en otro idioma de u tercer país, en lugar de hacerlo en el idioma internacional, que posee a la perfección y que lo ha llevado a ser designado vicepresidente de la Academia de Esperanto. Es autor de varios libros técnicos en danés e inglés —dijo— pero señaló que de sus dos obras recientemente publicadas en Esperanto,
"La vivo de la plantoj" (vida de las plantas) y "Atakoj kontrau gardenplantoj" (ataques contra las plantas de jardín), ya se han hecho ediciones en otros idiomas
El Dr. Neergaard en el día de hoy en continuación de su gira partirá del Uruguay.
Laboratorios
Sección Libano y jefe de sección del Servicio Estadual Danés de Protección de Plantas.
Ha publicado varios libros y estudios sobre tiropatología, micología y horticultura.
Es Presidente de la Comisión Fitopatológica de la Asociación Internacional de Contralor de Semillas.
REUNION DE PRENSA
En el día de ayer tuvo lugar una reunión con representantes de la prensa en la que el visitante



Paul Neergaard *

En novembro-decembro mi faris oficialan profesian vojaĝon al 10 landoj de Latinameriko**, nome Venezuelo, Kolombio, Peruo, Bolivio, Ĉilio, Argentino, Urugvajo, Brazilo, Meksiko kaj Kubo. La celo estis kontakti ministeriojn de agrikulturo, plantpatologojn kaj aliajn aŭtoritatojn por interkonsenti pri kunlaboro inter tiuj landoj kaj la Dana Ŝtata Instituto de Sempatologio por Evolulandoj, en Kopenhago. Tiu Instituto organizos en septembro ĉi-jare dusemajnan studkonferencon en Buenos Aires (Argentino) pri sempatologio kun partoprenantoj el preskaŭ ĉiuj landoj de la kontinento; ĉiuj kostoj de vojaĝo, partopreno kaj instruado estos pagitaj de la dana ŝtato. Krome la dana ŝtato disdonas stipendiojn, kiuj ebligas al plantpatologoj el evolulandoj, inkluzive tiujn de Latinameriko, fari sciencajn studojn ĉe la Instituto en Kopenhago.

Mi utiligis la vojaĝon ankaŭ por kontakti la Esperanto-movadojn en kelkaj el tiuj ĉi landoj, kaj laŭ la propono de la redakcio mi ĉi tie skizas kelkajn el miaj impresoj.

★ ★ ★ ★ ★

Sudameriko — kontinento izolita, laŭ eŭropanoj! Relative malabundas personaj kaj turismaj kontaktoj inter Eŭropo kaj Sudameriko. Ne mirige tial, ke ĉie, kie min akceptis esperantistoj, oni konsideris min rara birdo. Aliflanke, ĉar la cirkonstancoj en tiuj "foraj" lokoj estis al mi nekonataj kaj iuj malfacilaĵoj estis antaŭvideblaj rilate al la oficiala celo de mia vojaĝo, mi trovis saĝa plisekurigi min per lokaj esperantistaj kontaktoj. Fakte montriĝis, ke mi iufoje profitis el tiu "taktiko"!

En Sudameriko mi konstatis netan diferencon inter la movadoj en la nordaj kaj okcidentaj landoj kontraste al tiuj de la orientaj. En la nordo-okcidento mi vizitis Venezuelon, Kolombion kaj Peruon, kaj en tiuj landoj la movadoj ŝajnas esti en embria stato, dum en orienta Sudameriko, Argentino, Urugvajo kaj Brazilo la movadoj estas pli vaste establitaj.

En Venezuelo al mi rakontis iomete pesimisme inĝeniero Felix Garcia Blasques pri la inerteco de la movado. Pozitiva estis lia informo, ke persone li prilaboras Esperanto-terminaron pri hidraŭliko kaj serĉas kunlaborantojn (ĝis nun vane!).


En Kolombio la movado elmontris nepridubeblan ĝermipovon! Kelkaj viglaj, iniciatemaj junuloj kontaktis min, i.a. inĝeniero Diego Hoyos Escobar kaj ekonomia licenciito Libardo Vargas. S-ro Vargas interpretis intervjuon kun mi fare de la ĉefa ĵurnalo en Kolombio, *El Tiempo.* Oni instruas Esperanton en la Universitato de Bogotá, kaj oni optimisme priparolis la perspektivojn de la movado precipe inter junaj akademiuloj, el kiuj jam aliĝis pluraj al kursoj. Ili avidas kontakton kun aliaj landoj!

Televida kurso en Lima

Ankaŭ en *Peruo* la semo ŝajnas sufiĉe ĝermipova! Peris kontaktojn francdevena s-ino Jane de Skotte, landa UEA-perantino. Mi havis bonŝancon vidi lecio-

---

* Vicprezidanto de la Akademio de Esperanto.
** Latinameriko: Sudameriko kaj Centrameriko kune.



EN MONTEVIDEO d-ron Neergaard gastigis estraranoj de Urugvaja Esperanto-Societo en restoracio "Panorámico 11" la 26an de novembro 1972. De dekstre maldekstren: s-ro Pablo Escardó, d-ro R. Zeballos Morales, d-ro Paul Neergaard, s-ro Alberto Barrocas, s-ro José Marti, s-ro Ernesto Sonnenfeld, s-ro Victor Luis Cao kaj s-ro Adalberto Benko.

non de televida Esperanto-kurso, el programo de la Universitato de Lima. La kursgvidanto, s-ro Ulpiano Villanueva B., tre taŭge instruis la kunmetitajn tempojn. Vespere mi vizitis kurson, kiun gvidis s-ro Alberto Carillo Ramirez. La kursanoj estis viglaj gejunuloj, kelkaj universitataj studentoj.

Orienta Sudameriko

En *Argentino* mi estis en Buenos Aires, kie la loka societo posedas bone aranĝitan propran kunvenejon en la centro de la urbo. Mi estis tie kelkfoje. La grupo estas tre societema; venas tie sen formalaĵoj ĉiuvespere esperantistoj por interbabili, diskuti, legi gazetojn, utiligi la riĉenhavan bibliotekon (3 000 titoloj), kaj ne malofte sonoras la telefono; de iu kiu donas aŭ serĉas informon, aŭ eble simple volas "babili". Ĉio okazas en Esperanto; krokodiladon mi ne aŭdis. Mi povis ĝui la viglecon de la societanoj, ilian senton de humuro, kaj la ĝenerale tre altan lingvan nivelon. Malfacile mencii nomojn, ĉar neeble ne neglekti multajn: s-ro A.M. Corral, FD de UEA, sekretario de la Societo, ges-roj Clara kaj Jorge de Hess, f-ino Teresita Inéz A., prezidanto de Argentina TEJO-sekcio, . . .

Intervjuo en Urugvaja Televido

Kiam mi dum oficiala vojaĝo alvenas al lando, kutime min akceptas reprezentanto de la dana ambasado aŭ de la ministerio de agrikulturo, kun ellaborita programo de mia vizito, ĉu en la dana, angla aŭ la lingvo de la koncerna lando. Kia plezuro tial, je la alveno dimanĉe al Montevideo, Urugvajo, ricevi el la manoj de s-ro Victor Luis Cao, oficisto de la Ministerio de Eksterlandaj Aferoj, antaŭa diplomato en Japanujo, sekretario de Urugvaja Esperanto-Societo, oficialan programon en Esperanto, modele ellaboritan. Apenaŭ alveninte mi kaj kelkaj aliaj esperantistoj hastis al la televid-stacio de Montevideo por rekte elsendota intervjuo pri mia vizito en Esperanto kun s-ro Cao kiel perfekta interpretisto. Mi ĝuis la gastamecon en la hejmo de mia kolego, s-ro Ernesto Sonnenfeld, akademiano, prezidanto de Urugvaja Esperanto-Societo, kaj poste en restoracio kun la estraro de la Societo. Mi ricevis impreson pri la tre aktiva kaj kompetenta gvidado de la Esperanto-movado, kiu ĝuas ĝeneralan publikan respekton kaj simpation. Tamen, kvankam kvalite elstara, multnombra ne estas la movado en Urugvajo.

Impresa organiziteco en Brazilo

En *Brazilo* mi ricevis helpon valoran por mia oficista misio. Mi renkontis malfacilaĵojn aparte pro tio, ke la registaraj instancoj, i.a. la Ministerio de Agrikulturo, same kiel la dana ambasado, transloĝis lastatempe al la nova ĉefurbo Brazilio. Ĉe mia alveno simple mankis kontaktoj, eĉ informoj, por ne paroli pri konkreta programo de mia vizito. Nu, grandparte dank'al la lokaj esperantistoj mi sukcesis aranĝi taŭgan vizitprogramon. En la flughaveno akceptis min esperantistoj, estis neniuj oficialaj reprezentantoj, kaj feliĉe, en la propra sidejo de Kultura Kooperativo Esperantista en la centro de Rio de Janeiro, mi trovis eblojn telefone kontakti la necesajn instancojn. Precipe helpis min bonege s-ro Pandiá Pându, verkinto de ĵus aperinta tre ampleksa lernolibro de Esperanto. Necesis ŝanĝi la intencitan programon kaj flugi al São Paulo, viziti la Biologian Instituton, nuligi aranĝojn en Brazilio. En Rio de Janeiro min tre impresis la organiziteco kaj aktiveco de la Eldona Koopera-

Impresoj el Latinameriko

(daŭrigo de p. 65)

tivo, unu el kies eminentaj aktivuloj estas sendube advokato Bras Cosenza, dum alia estas s-ro Roberto das Neves. Idoj de la Kooperativo estas kelkaj vegetaraj restoracioj en diversaj partoj de la urbo; en unu el ili, plenplena de vizitantoj, mi bonege manĝis. Oni celas havi reton de ses tiaj restoracioj. Ankaŭ interese estis trovi, en grava centra placo de la metropolo, buston de Zamenhof — ne malproksime de statuo de Gandhi. Iom mire mi demandis, kiel oni povis tion atingi. Oni diris, ke en pluraj urboj en Brazilo estas Zamenhof-monumentoj, kaj, se interesgrupo havas seriozan proponon, la magistratoj sufiĉe liberale donas sian aprobon. En São Paulo, kie mi havis iujn gravajn obstaklojn, treege helpis min sindona esperantisto s-ro Nélson Silveira, kaj kelkfoje mi ĝuis agrablan kunestadon kun aliaj lokaj esperantistoj en la bela propra sidejo de la Societo, ankaŭ taŭge lokita en la centro de la urbego.

La Esperanto-movado en Brazilo evidente estas vigla kaj sufiĉe dinamika kaj ĝuas ĝeneralan publikan rekonon. Ŝajne ne estas sekreto, ke ekzistas iaj konfliktoj inter la landa asocio kaj la Kooperativo. Oni nepre devus solvi tiujn malfacilaĵojn. Mi sentas, ke ia diplomatia aktiveco por trovi akcepteblan bazon por la kunordigo de la landskalaj aktivecoj estas grava, senkonsidere de politikaj kaj filozofiaj diferencoj de vidpunktoj.

Centra Ameriko

En Meksiko mi havis valorajn kontaktojn kun individuaj esperantistoj. Mi mencias f-inon Alicia Zepeda Espinosa, peranto kaj VD de UEA, tre kapabla kaj iniciatema personeco, kiu tre afable aranĝis por mi la unuan veran turisman tagon de mia vojaĝo, i.a. viziton en ekzotika bazaro de la indianoj, kun abundeco de meksikaj legomoj, fruktoj, floroj kaj viandoj, kaj en la vespero mi ĝuis unikan folkloran baledon en la Palaco de l'Arto, ĉe kiu aliĝis alia simpatia samideano, kuracisto, d-ro Pedro Magaña Erosa. En Meksiko de tempo al tempo okazas kursoj de Esperanto. Ĝenerale la stato de la movado estas kredeble komparebla kun tiu de la okcidenta Sudameriko.

Kubo — ĉu aŭroro?

Kun aparta scivolo mi atendis mian viziton en Kubo. Distribuiĝis lastjare informoj pri eksperimenta instruado de Esperanto en Kubo kaj similaj oficialaj iniciatoj. Por laŭeble influi la intereson pri la Internacia Lingvo mi estis komisiita de UEA kontakti oficialajn instancojn por orienti kaj orientiĝi. Min kontaktis baldaŭ post mia alveno s-ro Pedro P. Lamas Dias, landa peranto de UEA, s-ro René Valdés, delegito de UEA, s-ro Oscar Otero Fernandez, prezidanto de Havana Esperanto-Rondo, societo, kiu fondiĝis en marto 1972, kaj aliaj esperantistoj.

Kvankam relative novaj esperantistoj, ili bonege regas la lingvon. Montriĝis, ke la atingaĵoj ĉe oficialaj instancoj estis tre limigitaj, kvankam la sinteno principe estas pozitiva. Post fondiĝo de la menciita Rondo, kun tiutempe nuraj ses membroj, oni preparis modestan ekspozicion kaj oni informis pri ĝi kaj pri Esperanto per malgranda radia elsendo. Neatendita estis la reago: ĉ. 200 leteroj estis ricevitaj. Post kuraĝiga vizito de ĉeĥa ĵurnalisto, s-ro Oldřich Kníchal, oni atingis aprobon de sindikato kaj organizis kursojn. S-ro Carlos Garcia, nacia direktoro pri instruado de lingvoj, interesiĝis; oni sendis observanton al Germana Demokratia Respubliko, kaj post favora raporto oni la 1-an de decembro 1972 komunikis decidon komenci eksperimentan kurson en unu el la Lingvaj Akademioj por instruistoj kaj studantoj (ekzistas 46 tiaj Akademioj en Kubo). La Ministerio de Instruado plue sendos observantojn al la nun okazantaj tri kursoj (100 gelernantoj entute). Estis la intenco, ke mi havu konferencon kun la supre menciita nacia direktoro de lingva instruado, s-ro Garcia, sed bedaŭrinde tio neebliĝis pro lia malsaniĝo. Ŝajne restis pro tio nenio por fari. Tamen post ioma insisto de mia flanko ni havis treege utilan kunsidon en la Ministerio pri Ĝenerala Instruado kun s-ro Israel Monteguin, dua vicministro, kaj kun du aliaj funkciuloj de la Ministerio, inter kiuj estis la ĝenerala direktorino de instruado pri la angla lingvo en Kubo. Mi proponis fari eksperimentan instruadon de Esperanto en lernejoj eble laŭ modelo de la siatempaj eksperimentoj pri paralela instruado de la franca/Esperanto kaj nur la franca en Britujo. Oni multe interesiĝis pri tiuj ebloj por pedagogia utiligo de la Internacia Lingvo kiel lingva propedeŭtiko.

Oni aranĝis kunvenon de lokaj esperantistoj, en kiu mi prelegis pri spertoj kaj perspektivoj de la Esperanto-movado. La pli granda parto de la tre viglaj ĉeestantoj estis junuloj — meza aĝo eble 25 jaroj. Pro la alta lingva kompetenteco, inteligento kaj iniciatemo de la gvidantaj junuloj kaj pro la pozitiva reago flanke de aŭtoritatoj, mi ne dubas, ke ni baldaŭ havos pli da kuraĝigaj novaĵoj el la juna movado en Kubo.

Paul Neergaard



Zamenhof-monumento en la Placo de la Respubliko en Rio de Janeiro, Brazilo.

13 Interligiteco kaj celo

Informado, eĉ la plej trafa, apenaŭ havas sencon, se ĝi ne estas ligita al la du aliaj ĉefaj branĉoj de aktivado: instruado de la lingvo kaj ĝiaj praktikaj aplikoj en la plej vasta senco de la vorto. Nur bone studita kaj planita, celkonscia, paralela agado sur la tri kampoj donas kontentigajn rezultojn kun daŭra valoro.

Evidente: la praktikaj aplikoj ne povas vastiĝi, se samtempe ne grandiĝas la nombro de lingvosciantoj; tiu nombro ne povas grandiĝi, se forestas la kondiĉoj ebligantaj instruadon kaj lernadon (lernolibroj kaj vortaroj, lernejaj kaj ĉiaspecaj eksterlernejaj kursoj, kompetentaj instruistoj kaj kursgvidantoj); eĉ la plej bonaj lernokondiĉoj restas senrezultaj, se informado ne kreas la necesan favoran agordon. Aliflanke, informado ne povus krei la favoran agordon, se ĝi havus nenion por diri rilate la praktikajn aplikojn kaj la lernoeblecojn, dum akirado de la lingvoscio estus neimagebla sen perspektivoj pri praktikaj utiligoj en plej diversaj formoj.

La tri branĉoj kune, apogantaj unu la alian kaj reciproke apogataj, garantias firman, konstantan progresadon.

En la kadro de tiu interdependeco, la celo de la informado estas: (i) diskonigi la Internacian Lingvon kaj ĉion kreitan en ĝi aŭ pere de ĝi; (ii) detrui la antaŭjuĝojn, precipe en la ŝlosilaj pozicioj de la kulturo kaj de la publika vivo; (iii) instigi al la lernado de la lingvo kaj altiri novajn adeptojn (p-to 2 de la Principaro de Frostavallen).

Ekzistas ankoraŭ multaj kazoj de tute abstrakta, senperspektiva informado, nome tia, kiu malatentas la menciitan celon kaj la ligitecon de informado kun la du aliaj branĉoj, same kiel ankoraŭ tro ofte oni centrigas la agadon ĉu sole al instruado, ĉu nur al insistado pri vastigo de la praktikaj aplikoj sen kia ajn aŭ sen sufiĉa paralela laboro en la du aliaj sferoj. Sed ankaŭ abundas kazoj de vere celtrafa informado. Lerte enkadrigita en la ĝenerala agado por la disvastigo de la Internacia Lingvo sur ĉiuj niveloj, — monda, landa, loka kaj faka — ĝi donas rimarkindajn rezultojn. Du ekzemploj meritas koncizan pritrakton. Unu rilatas al informado sur landa nivelo, la alia montras efikan laboron en loka kadro.

14 Ekzemploj de BEA kaj Walla Walla

Bulgara Esperantista Asocio (BEA) estas la plej granda kaj la plej forta landa Esperanto-organizaĵo en la mondo. Ĝi havas 5 100 membrojn, kio, same kiel en aliaj landoj, estas nur parto de ĉiuj personoj posedantaj la lingvon en pli aŭ malpli alta grado. Se oni konsideras la relativan malgrandecon de la lando kaj la nombron de la loĝantaro (ĉ. 8,5 milionoj), ankoraŭ pli elsaltas la forto de BEA. Ĝi havas pli da organizitaj Esperanto-parolantoj ol la brita, germana kaj franca landaj asocioj kune (entute ĉ. 4 500), pli ol la 5 skandinaviaj landaj asocioj (entute ĉ. 3 800, el kiuj nur la sveda ĉ. 1 800), ktp. Bulgarujo estas la sola lando, en kiu la Esperanto-movado fariĝis preskaŭ amasa.

Kiamaniere BEA atingis tiun unuarangan pozicion? Sufiĉas sekvi ĝiajn raportojn de la lastaj jaroj kaj legi la Rezolucion de ĝia 38-a Kongreso (junio 1972) por kompreni kaj aprezi.

En tiu lando, la informado, konforma al la bezonoj kaj konkreta situacio, evoluas samtempe en pluraj direktoj: daŭraj firmaj kontaktoj kun la aŭtoritatoj; konstanta informado per bonaj artikoloj kaj interesaj sciigoj en la ĉefurbaj kaj provincaj gazetoj; informoj per la radio kaj utiligo de la Esperanto-elsendoj de Radio Sofio ankaŭ por informaj celoj; uzo de Esperanto por diskonigi la propran landon tra la mondo (tradukoj el la bulgara literaturo, gvidlibroj kaj faldfolioj, turisma servo, ktp.); organizo de amasaj renkontiĝoj, interalie festivaloj kun 1 000 ĝis 1 500 partoprenantoj, aŭ fakaj konferencoj kaj seminarioj, ekzemple la 20-taga kurso en Burgas, kiun partoprenis 133 geinstruistoj; organizo de fakaj ekskursoj al eksterlando en kunlaboro kun ŝtataj aŭ kooperativaj turismaj entreprenoj; evoluigo de amikecaj rilatoj kun eksterlandanoj per korespondado kaj aliaj metodoj, interalie por amasa partopreno en la Semajno de Internacia Amikeco, lanĉita de UEA antaŭ kelkaj jaroj; kulturklerigaj aranĝoj en urbaj kaj vilaĝaj Esperanto-societoj kun paralela informado sur loka nivelo; kaj multaj aliaj similkarakteraj agadoj. Ĉio ĉi estas kuplita kun la paralelaj klopodoj maksimume disvastigi la instruadon de Esperanto. Rezulte, la Internacia Lingvo estas nun oficiale instruata en la Ŝtata Universitato de Sofio, en kelkaj institutoj kaj mezgradaj lernejoj, kiel ankaŭ, ekster la lerneja programo, en pluraj elementaj lernejoj. Kompreneble, la instruado en la lernejoj ne nur donas pluan taŭgan materialon por informado, sed ankaŭ faciligas la altiron de novaj gelernantoj al kursoj regule aranĝataj en la lokaj societoj: en la pasinta laborjaro 2 378 gelernantoj studis Esperanton en lernejaj klasoj kaj kursoj, dum pli ol 2 000 aliaj personoj partoprenis en la kursoj, kiujn organizis la lokaj societoj.

Superflue diri, ke tiu tuta laboro, elstare planita kaj bone organizita, ne povis ne fortikigi la rilatojn kun la aŭtoritatoj, kio siavice helpis kaj plu helpos la laboron de BEA.

Oni ne kredu, ke la plej forta landa Esperanto-Asocio nun kontente ripozas. Ĝi plu konstruas kaj vastigas la agadojn. La Kongresa Rezolucio antaŭvidas aron da novaj iniciatoj kaj ampleksigon de la jam funkciantaj laboroj en ĉiuj direktoj. Aparta atento estos dediĉita al organiza fortikigo de la multnombraj lokaj grupoj, altiro de gejunuloj, plibonigo de la elsendoj de Radio Sofio, pli efika partopreno en la internacia Esperanto-movado, pli sistema popularigo de la bulgaraj literaturo kaj kulturo ĝenerale, pli vasta konatigo de Bulgarujo kiel lando de internacia turismo,

Por pli efika informado

(daŭrigo)


ampleksigo de instruado de la lingvo en la lernejoj kaj alimaniere, intensigo de informado, ktp.

La alia ekzemplo koncernas sukcesan laboron sur loka nivelo en lando, kiu, diference de Bulgarujo, estas unu el la grandpotencoj, havas tute alian ekonomian-socian-politikan strukturon, kaj kies lingvo estas multe uzata ankaŭ en internaciaj rilatoj. Walla Walla estas relative malgranda urbo en la ŝtato Washington, Usono. El multnombraj gazeteltranĉaĵoj de tekstoj aperintaj en la lokaj gazetoj en 1972 vidiĝas, ke tie aktivas loka grupo sub prezido de d-ro Quentin Schwenke, al kiu multe helpas lia edzino kaj pluraj membroj. La verkanto de tiuj ĉi linioj neniam pli frue aŭdis pri ili, nek ricevis kian ajn raporton pri la agado de la loka societo en Walla Walla. La gazetaj eltranĉaĵoj, ĵus ricevitaj, parolas per si mem:

Unue, fine de januaro 1972, la loka *Walla Walla Union-Bulletin* publikigis longan intervjuon kun s-ino Quentin R. Schwenke kaj aperigis ŝian foton. El la intervjuo klare vidiĝas ŝiaj multflankeco, klereco, interesiĝo pri muziko kaj sporto. Nur en la fino estas menciite: "Unu el miaj ŝatoj estas instruado de Esperanto al klaso de gelernantoj". Sekvas kelkaj koncizaj informoj pri Esperanto kaj pri la Universala Kongreso okazonta en Portland. La komenca impreso estas bonega: klera figuro, bone konata en la loka komunaĵo, *interalie* aktivas ankaŭ por la Internacia Lingvo; nenia altrudado, nenia diskuto aŭ superflua pledado por Esperanto, sed nur konstato de fakto, kiu per si mem estas pledo. En februaro la gazeto informis, ke 9 gestudentoj sukcesis en siaj ekzamenoj pri Esperanto, kaj ke la loka societo mendis mikrofilmon de la disertacio *"Esperanto Language as a Literary Medium"* (La lingvo Esperanto kiel Literatura Perilo), per kiu Margaret Hagler (Universitato de Indiana) doktoriĝis. La dua informo estas ne nur interesa, sed ankaŭ kontribuas al plua altigo de la prestiĝo de Esperanto. Inter majo kaj oktobro aperis tuta aro da aktualaj artikoletoj kaj informoj pri eventoj ligitaj al loka aktivado, ekzemple pri prezentado de filmoj kun teksto en Esperanto, partopreno de lokaj reprezentantoj en la UK en Portland, organizo de novaj kursoj en aŭtuno, ktp. En unu el la numeroj aperis granda foto de tre ĉarmaj gelernantoj en loka lernejo, kiuj "post nur dumonata lernado de Esperanto... komencis korespondi kun gelernantoj en Francujo, Britujo, Italujo, Nederlando, Germanujo kaj Pollando..." La kelklinia informo trafas la celon, ĉar ĝi montras al la publiko, ke oni povas sukcese utiligi Esperanton jam dum la lernado. En oktobro, do post la UK en Portland, la informado, bone antaŭpreparita en la antaŭaj monatoj, atingis sian pinton. Aldone al 5 pliaj artikoloj en 3 gazetoj, aperis ankaŭ 2 pagitaj anoncoj pri la novaj kursoj por komencantoj: unu pri la dumtagaj kaj vesperaj klasoj en la Esperanto-societo de Walla Walla; la alia pri radiokurso de Esperanto, kiun la loka radio-stacio KGTS efektive komencis disaŭdigi la 16an de oktobro. Tiuokaze la periodaĵo *"The Collegian"*, organo de la Studenta Asocio en la kolegio de Walla Walla, informis, ke la kurson produktis la Centro pri Komunikado de la Ŝtata Universitato de Ohio. La gazeto akcentis, ke la Esperanto-kurso estas parto de la programo doni pli da eduka valoro al la elsendoj de la radio-stacio.

Ankaŭ en tiu ĉi kazo la laboro ne finiĝis per la tre kontentiga atingo. En novembro kaj decembro aperis pliaj artikoloj kaj informoj. La loka societo memorigis la datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof, organizis prelegon de japana studento en la Universitato de Portland, aranĝis paroladon de kompetenta persono pri Urugvajo, trafe uzis la rubrikon "Leteroj de la legantoj" en la loka gazeto, kaj utiligis ĉiun okazon por objektive prezenti la Internacian Lingvon kaj ĝian valoron.

Ĉi tiu viveca bildo pri lernejanoj en la usona urbo Walla Walla aperis en loka gazeto kun klarigo, ke "post nuraj du monatoj da lernado de Esperanto ili jam komencis korespondi" kun samaĝuloj en pluraj landoj. Jen ekzemplo de simpla kaj tre efika informado . . .



***

Nek en la multjara laboro de BEA, nek en la pli modesta de la societo en Walla Walla estas trovebla unusola el la eraroj, pri kiuj atentigas la Principaro de Frostavallen kaj kiuj estas mallonge pritraktitaj en la antaŭaj artikoletoj.

La du ekzemploj, intence prenitaj el du tre malsamaj medioj, montras tute klare, ke ĉie en la mondo ekzistas multaj eblecoj por solida informado, kies karaktero povas kaj devas esti adaptita al la landaj aŭ eĉ lokaj cirkonstancoj, sed ĉiam konforme al la bazaj ideoj entenataj en la Principaro de Frostavallen. La du ekzemploj estas instruaj ankaŭ el alia vidpunkto: la tuta stilo aplikata en Bulgarujo verŝajne havus malmultan efikon en Usono, kaj tiu de Walla Walla certe ne estus aplikebla en Bulgarujo. Ankaŭ la stilo de la laboro devas esti konforma al la kutimoj kaj konkretaj cirkonstancoj en unuopaj landoj.

La fakto, ke estas prezentitaj nur du ekzemploj, neniel signifas, ke ne troviĝas centoj da aliaj pozitivaj aktivadoj en tiu ĉi branĉo.

LOKE — FAKE — PERSONE

LOKE

Britujo

• Inter la unuaj celoj de la nova por-Esperanta grupo de britaj parlamentanoj estas la akceptigo de la Internacia Lingvo kiel ŝtata ekzamenobjekto por lernejoj. La prezidanto de ILEI, la brita lernejestro Raif Markarian, preparis por la parlamentanoj (kies nombro kreskis jam ĝis 31) memorandon pri la temo. La grupo ampleksas ĉiujn tri ĉefajn politikajn partiojn.

Eŭropo

• La nederlanda urbeto Zevenaar decidis proponi al siaj du ĝemelaj urbetoj (Weilburg en FR Germanujo kaj Tortona en Italujo) igi siajn loĝantarojn lerni Esperanton samtempe kiel en Zevenaar. Por stimuli pli oftan kontaktadon inter la 3 ĝemelaj urbetoj, Zevenaar cetere konsideras 50-procentan subvencion por vojaĝkostoj al junuloj, kiuj vizitos la ĝemelajn urbetojn.

Francujo

• Kastelo Grésillon nun plibeligas sin por povi konvene akcepti pli da kursoj kun pli da homoj kaj por tio atendas financajn apogojn. Ĝia kasisto: s-ro Maurice Coussé, 11 Rue Alain de Rougé, F-72300 Sablé sur Sarthe, Francujo.

Israelo

• La nuntempan aktivadon de la movado — en gazetaro, televidaj intervjuoj kaj aranĝado de kursoj — Esperanto-Ligo Israela bazas sur apogo de aŭtoritatoj. La klubejon, sufiĉe grandan, donas senpage al la Ligo la laborista sindikato Histadrut; la salonojn por la kursoj la urbestraro de Tel-Aviv. Cetere la registaro liberigis la Ligon de ĉiuspecaj impostoj ĝis nun kaj por la venontaj tri jaroj.

Italujo

• En la 7a de februaro grupo da esperantistoj apartenantaj al la socialdemokratia partio havis renkontiĝon kun la vicministro Nicolazzi, kiu estas estrarano de la partio kaj kiu siatempe prezentis al la koncerna komisiono de la parlamento leĝproponon por enkonduko de Esperanto al la lernejoj. Per tiu renkonto la italaj esperantistoj esperas antaŭenigon de la leĝopropono.

Usono

• En Novjorko la nombro de la lernejoj, kie okazas Esperanto-kursoj, kreskadas en la lastaj kelkaj monatoj de kelko al deko. La ĉefa kursomaterialo estas la modernstila libreto de la eldonejo Channing L. Bete: *A First Course in Esperanto,* de William Auld.

PERSONE

Bormann

• D-ro Werner Bormann, UEA-estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj kaj pri organiza plifortigo, prelegis en la ĉi-jara kongreso de la Esperanto-Asocio de Finnlando en februaro. Ankaŭ en ne-Esperantaj instancoj li parolis germanlingve pri la ĝeneralaj lingvaj problemoj. La gazetaro bone reagis.

Ĝuĝev

• En januaro oni celebris la 70-jariĝon de d-ro Stojan Ĝuĝev, membro de la Akademio de Esperanto kaj iama prezidanto de Bulgara Esperanto-Asocio, ne nur pro lia por-Esperanta aktiveco sed ankaŭ pro lia merito sur la scienca kampo. D-ro Ĝuĝev estis jam triafoje dekorita per alta ŝtata ordeno.

KOREUJO:

En januaro okazis Esperanto-kursoj en du universitatoj: la Universitato de Myoung-ji kaj la Universitato de Guj-ĵe. En la unua gvidis s-ro Gim Taeking, kaj en la dua, s-ro So Bom-su. Pro tio, ke s-ro So havis ŝancon paroli pri Esperanto kaj sia kurso en televida programo, partoprenis la kurson 320 personoj (foto).



LOKE - FAKE - PERSONE

(daŭrigo de p. 69)

FAKE

Fervojo

• La Japana Esperanto-Ligo de Fervojistoj sukcesis aperigi la rezultojn de sia enketo — pri la fervojistaj laborkondiĉoj en 14 landoj — en la ĵurnalo de la Japana Ŝtata Fervojo (1973-02-21). Kunlaboris en la enketado la UEA-fakdelegitoj pri fervojo.

Literaturo

• Ankaŭ ĉi-jare okazos la literatura konkurso "Patrolkonkurso" en Italujo. La organizantoj ("Patrolkonkurso 1973", Via Pantano 17, I-20122 Milano) atendas kontribuojn de literatur-amantoj el la tuta mondo. La limdato: 1973-07-01. La rezultoj de la konkurso estos publikigitaj okaze de la 44a Itala Esperanto-Kongreso en Trento (septembro).


Tendumado

• La jam konata tendumado "Somera Esperanto-Tendaro" en Lančov (Ĉeĥoslovakujo) okazos ĉi-jare 20a-foje, en tri periodoj: "Seminario", de la 8a ĝis la 14a de julio; "Unua Etapo", de la 15a ĝis la 28a de julio; "Dua Etapo", de la 29a de julio ĝis la 11a de aŭgusto. Antaŭtagmeze okazos kvin diversgradaj Esperanto-kursoj kaj posttagmeze varia sportado. Adreso de la organizantoj: Esperanto-Klubo en Třebíč, CS-674 01 Třebíč, Ĉeĥoslovakujo.


• Internacia Esperanto-Tendaro okazos ĉe la lago Päijänne apud Vääksy (Finnlando) de la 7a ĝis la 15a de julio. Aliĝiloj kaj informiloj estas peteblaj ĉe Internacia Esperanto-Tendaro, T. Suontausta, SF-17300 Vääksy.

BURUNDIANO SUKCESE PRELEGVOJAĜIS EN SVEDUJO — DANK' AL "INTER"

S-ro Justin Minani el Burundio (sur la foto, maldekstre) ĵus finis tre sukcesan serion de 13 prelegoj en okcidenta Svedujo antaŭ publiko de entute 1 433 personoj. La prelegojn li faris en Esperanto, kaj ges-roj Iva kaj Lennart Åberg interpretis en la svedan. Temas pri la unua el pluraj prelegserioj de eksterlandanoj, kiujn aranĝas Inter — Agadgrupo por Esperanto, laŭ komisio de la Okcidentsveda Societo por Unuiĝintaj Nacioj. La Agadgrupo serĉis la prelegontojn pere de anoncetoj en la revuo "Esperanto". S-ro Minani prelegis unuavice pri sia lando kaj pri la masakroj tie okazintaj en la lasta jaro, sed ankaŭ pri la popola muziko de Burundio. Sur la foto: S-ro L. Åberg interpretis intervjuon por unu el kvar svedaj ĵurnaloj, kiuj aperigis ampleksajn raportojn.




RE CENZOJ



KONDIĈOJ DE RECENZOJ

La revuo *Esperanto* principe recenzigas duope ricevitajn novajn librojn kaj diskojn, escepte de nete politikaj. Pri pli gravaj religiaj eldonaĵoj aperas recenzoj neŭtralaj. Eldonaĵojn unuope ricevitajn ni nur mencias. Recenzoj nepetitaj ne aperas.



Ama interplekto

Recenzas Clelia Conterno (Italujo):

Kit vivas, de Jytte Lyngbirk. El la dana lingvo tradukis Gudrun Riisberg. Aabyhøj: Dansk Esperanto Forlag, 1973. 92 p. 21 cm.

Ŝajnas al mi, ke la nivelo de nia literatura produktado rapide kaj senteble altiĝas. Jen denove libro, kiun oni devas legi, ne ĉar ĝi estas en Esperanto, sed simple ĉar ĝi estas bela kaj mirinde bone tradukita. Ĝi iel memorigas la leganton pri la fama *Love story:* ĝi posedas ties senperon kaj verecon en la analizo de la nunaj junulaj rilatoj.

Knabino 17-jara implikiĝis en la reto de haŝiŝo; ŝi provas sinmortigi; knabo 19-jara, sed pli matura kaj pli konscia ol ŝi, savas ŝin el la akvo, kaj klopodas savi ŝin ankaŭ morale. Ĉu li sukcesos? La intereso de la leganto estas daŭre strečata ĝis la lastaj vortoj, entenantaj la respondon. Sed, eĉ pli ol la kanvaso, gravas la rapida, sed preciza priskribo de medioj kaj homoj: la patrino de ŝi, jam senpova antaŭ la konduto de sia knabino; la patrino de li, komprenema kaj amika al sia morale sana filo; kaj ambaŭ ĉefrolantoj, tiel vivecaj, tiel nature veraj, ama interplekto de unuflanke dubema, senespera ina sopiro al saviĝo, kaj de ia vira sento de respondeco aliflanke.

Mendu ĉe UEA: 11,58 gld. (por Nederlando 12,02 gld.) plus sendokostoj 10%.

Orienta Renesanco

Recenzas Joŝimi Umeda (Japanujo):

Orienta renesanco, de H. Fortmann. El la nederlanda lingvo tradukis E.N. Mulders. Tilburg (Nederlando): Serio de Internacia Katolika Informejo: n-ro 25, 1972. 56 p. 19 cm.

La procezo, kiel povos renkontiĝi la du kulturterenoj de Okcidento kaj Oriento, estas jam malnova sed ankoraŭ aktuala problemo por multaj pensuloj de la mondo. Jen venas alia kontribuaĵo tiurilata.

Han Fortmann (1922-1970), nederlanda sacerdoto konata samtempe kiel profesoro pri la psikologio de kulturo kaj religio kun multaj verkoj tiukampaj, aparte interesiĝis pri hinduismo kaj budhismo kaj tial profunde esploris la supran problemon laŭ diversaj fontoj surlokaj. En tiu ĉi libreto, verkita sur lia mortlito, li esprimas bazajn pensojn el tiu studado.

Konsistanta el 6 ĉapitroj, kiuj koncize reliefigas la diversajn fazojn de la kontrasto inter Okcidento kaj Oriento, ĝi trafe prezentas kritikojn pri eŭropa-amerika kulturo tro racionalisma kaj alvokas al la legantoj pri multo lerninda el la orientaj viv- kaj pensmanieroj.

Laŭ aktuala temo kaj sugestiva enhavo kun bone elpensita argumentado, la verko valoras esti tradukita en Esperanton. La traduko mem glate fluas, krom tio ke iom lamigas la stilon ofta metado de *jes* antaŭ verbo (ekz. 3-foje en 5 linioj de p. 14).

Mendu ĉe UEA: 3,60 gld. (por Nederlando 3,75.) plus sendokostoj 10%.

Viva voĉo de Auld

Recenzas Vilma Eichholz (Kanado):

William Auld legas poezion. Falkirk, Stirlingshire (Britujo): Krea Sono, 1972. Disko 33 t/m. Diametro 18 cm. Duflanka. Daŭro: 10 minutoj. Tekstofolio aldonita.

Kvankam en presita formo abundas la poezia literaturbranĉo en nia lingvo, troviĝas en la longa listo de la nun haveblaj gramofondiskoj nur malmultaj poeziaj. Tial ni bonvenigu la pliriĉigon.

El kvar el siaj poemaroj William Auld elektis por la disko kvin reprezentajn verkojn: *Ebrio* (el "Kvaropo"), *Vi estas la maro* (el "Unufingraj melodioj"), *Incitnudiĝo* kaj *La gardantoj* (el "Humoroj") kaj ĉapitro 14 (el "La infana raso"). Nura legado de poezio ne efikas tiel forte kiel bona deklamo. Por sperti tion mi proponas, ke vi legu unue la poemon "Ebrio" kaj ke vi poste travivu per la disko la ebriiĝon de la aŭtoro! Mi dubas, ĉu iu povus pli bone prezenti la karakteron de la poemo. William Auld modele elparolas, eĉ liaj 'l' kaj 'r' ne perfidas la gepatran lingvon kaj kontentigus teatrajn postulojn.

Mendu ĉe UEA: 7,74 gld. (por Nederlando 8,50 gld.) plus sendokostoj 10%.

Komputila bibliografio

Recenzas Paul Neergaard (Kopenhago):

Nederlanda bibliografio: Bibliografio pri la tradukaĵoj el la nederlanda literaturo, de Petro De Smedt. Dendermonde (Belgujo): la aŭtoro, 1972. 240 p. Ofsetita. 14 x 19 cm.

Jen denove bibliografio pri la Esperanta traduk-literaturo de unuopa lingva regiono, ĉifoje la nederlanda, inkluzive de la flandra (Belgujo). Ĝi sekvas similajn bibliografiojn por Danlando, Japanujo, Jugoslavio, Norvegujo.

La amplekso de la bibliografiigita materialo impresas. Ĝi inkluzivas 1169 verkaĵojn de 327 nederlandlingvaj aŭtoroj, kaj enestas indekso de 239 tradukintoj. Krom libraj eldonaĵoj estas prilaboritaj kaj indeksitaj 42 gazetoj kaj 17 kompilitaj verkoj (antologioj k.s.), al kiuj aldoniĝas 107 verkaĵoj, kiuj troviĝas en manuskripta formo. Fine estas indekso laŭ la titoloj de la verkaĵoj.

La Bibliografio apartiĝas per tio, ke ĝi estas kompilita kaj kompostita helpe de komputilo. Tio faciligis la plurmanieran aranĝon de la registrita materialo.

Tiu ĉi kompilaĵo estas vere serioza kaj laŭimprese fidinda kontribuaĵo al nia bibliografia kaj esperantologia literaturo. Ĝin nepre devas akiri ĉiuj Esperanto-bibliotekoj iome ampleksaj kaj ĉiuj sciencaj studantoj de nia literaturo! Ĉar la eldonnombro indikita estas nur 200, interesitoj ne estu prokrastemaj!

Mendu ĉe UEA: 10,– gld. (por Nederlando 10,40 gld.) plus sendokostoj 10%.

LASTE APERIS...



Deutsch-Esperanto Taschenwörterbuch (1971) Erich-Dieter Krause. 279p. 14cm. 6,60 gld. Poŝformata vortaro germana-Esperanta, komplementa al la alidirekta vortaro de la sama aŭtoro. Enhavas 12 000 artikol-vortojn, ankaŭ parolturnojn el diversaj flankoj de la ĉiutaga vivo. Kun aldonitaj klarigo pri la prononco de Esperanto kaj nombrotabelo.

Internacia ekzameno: specimenaj demandoj (1973) 6p. 21cm. 1,36 gld. Demandoj el la Internacia Ekzameno de UEA el la jaroj 1962-1972. Valora helpilo por estontaj kandidatoj.

Kun sopira koro Gustavo Adolfo Becquer (1836-1870). 93p. 18cm. 6,– gld. El la hispana tr. Fernando de Diego. (1972). Poemaro de la plej elstara hispana lirikisto. Originala titolo: *Rimas.* Enkonduko de José Ignacio Ciordia.

Nikolao Kopernik, Torunano (1972) C. Iwaniszewska. 6p. 21cm. 0,60 gld. Biografieto pri la fama astronomo, precipe rilate lian agadon en sia naskiĝurbo Toruń.

Ordliste Norsk-Esperanto; Malŝlosilo norvega (1972) R. Bugge-Paulsen. 64p. 12cm. 3,78 gld. Vortareto samformata kiel la konataj "ŝlosiloj". 4000 norvegaj vortoj, listo de land- kaj gentonomoj, citaĵoj de famaj homoj pri Esperanto.

Orienta renesanco, kritikaj konsideroj pri la nuntempa kulturo (1970) H. Fortmann (1912-1970). Tr. el la nederlanda (1972). 56p. 19cm. 3,60 gld. (Serio de Internacia Katolika Informejo, 25). Psikologia analizo de orientaj mondkonceptoj rilate al ilia ebla renkontiĝo kun la racionalisma kaj objektivisma pensmaniero de la okcidento.

Stirio – Steiermark, feria revo (1973) Ilus. turisma faldfolio. 21 x 10 cm. Ricevebla kontraŭ afranko ĉe Esperanto-Societo Unueco, Graz, A-8020, Eggenbergergürtel 32/2, Aŭstrujo.

Televízny kurz Esperanta (1972) Pavol Rosa. 70p. 29cm. 2,76 gld. Lernolibro de la Esperanto-kurso de Slovaka Televido en Bratislava, Ĉeĥoslovakujo. 17 lecionoj kun gramatika klarigo en la slovaka lingvo.

William Auld legas poezion (1972) William Auld (1924-). Disko duflanka, monofona. 18cm. 33 t/m. 7,74 gld. (CSA 106). La aŭtoro legas el siaj 4 poemaroj 5 reprezentajn verkojn: *Ebrio, Vi estas maro, Incitnudiĝo, La gardantoj* kaj la ĉapitron 14 el *La infana raso.* Presitaj tekstoj kunestas kun la disko.

Ĉiujn mendojn adresu al: Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj k.c. 16% pro la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por la sendokostoj.

SUK-asocio

Fine de la jaro 1972, en Lieĝo (Belgujo), la asocio Someraj Universitataj Kursoj (SUK) iĝis belga leĝe registrita asocio, t.n. "asocio sen profita celo", kies celo estas okazigi universitatnivelajn kursojn, precipe dumsomerajn, kun Esperanto kiel laborlingvo.

La estraro de la SUK-asocio konsistas el: Prezidanto Ernest Natalis (emerita profesoro de la Ŝtata Universitato de Lieĝo); sekretarioj Léon J. Hauregard (profesoro en la Ŝtata Supera Teknika Instituto en Verviers) kaj Uwe Joachim Moritz (gimnazia instruisto en Eschweiler); kasisto André Heck (asistento en la Universitato de Lieĝo); kaj konsilisto Pol Denoël (doktoro pri medicino, prezidanto de Belga Esperanto-Federacio).

Surbaze de la sukceso de la unua sesio de la Someraj Universitataj Kursoj (aŭgusto 1972) estas decidite, ke la dua sesio okazu de la 4a ĝis la 25a de aŭgusto 1974a, denove en la modernaj ejoj de la Universitato de Lieĝo en Sart Tilman. Kompare al 1972, la nombro de la studdirektoj estos pligrandigita; okazos kursoj kaj praktikaj ekzercoj pri sociolingvistiko, biologio kaj kemio. Kiel la unua sesio, ankaŭ la dua ampleksos studvizitojn, filmvesperojn, ekskursojn kaj perfektigan Esperanto-kurson.

Por garantii laŭeble altnivelan programon, la estraro de la SUK-asocio elektis jenajn sekciajn prezidantojn: kemio – prof. S. Kawamura el la Universitato de Kagawa (Japanujo); biologio – prof. C. Støp-Bowitz el la Universitato de Oslo (Norvegujo); sociolingvistiko – d-ro J.C. Wells el la Universitata Kolegio de Londono (Britujo).

Tiu ĉi dua serio de SUK estas certe grava paŝo en la direkto de ĉiujaraj kursoj kaj fine al normala universitata instruado helpe de Esperanto.

Pri iuj ajn detaloj (programo, kotizoj, stipendioj, partoprenkondiĉoj, kursotekstoj ktp.) skribu al la SUK-estraro (Someraj Universitataj Kursoj, Boîte Postale 9, B-4000 Liège, Belgujo.)

SUK-estraro

LETEROJ
DE
LEGANTOJ



Ĉu ne eblus aparte presi?

Skribas Runo Stridell (Svedujo):

Kelkfoje aperas en *Esperanto* kalendaro pri okazontaĵoj kaj tabelo pri radio-elsendoj. Mi kutimas multobligi ilin kaj uzi ilin kiel reklammaterialon pri la lingvo. Mi ekpensis, ke eble oni povus presi ilin sur apartaj paperoj kaj enmeti po kelkaj en la gazetkovertojn, petante, ke la ricevontoj uzu ilin por informado.

Respondas la redakcio:

Bona ideo, sed bedaŭrinde la tarif-limo de la afranko malpermesas al ni aldoni pliajn enmetaĵojn en la revuon sen grandegaj elspezoj por afranko. Al unuopaj petantoj, tamen, ni ĉiam povas liveri depresaĵojn, ĉu de tiuj tabeloj, ĉu de aliaj artikoloj. La kosto por la petanto estus, ekzemple por la radio-tabelo, po 0,05 gld. por ĉiu ekzemplero, plus sendokostoj.

Utiligi simplan vojon

Skribas Walter F.J. Walther (F.R. Germanujo)

Interne de la ĉiusemajna Esperanto-kurso en la popola altlernejo en Kronach mi regule dufoje monate prelegas pri iu ĝenerale interesa Esperanto-temo. La zorge preparita manuskripto tuj poste iras al la redakcio de *Coburger Neue Presse,* kiu konstante informadas la vastan neesperantistan publikon pri la grupa laboro kaj la lingva problemo. Interalie aperis tiamaniere traduko de la artikolo de prof. d-ro Lapenna el la januara eldono de "Esperanto" sub la germana titolo "Auf dem Wege zur Integration" (Survoje al integriĝo). La esperantistoj devus pli konscie utiligi la gazetaron por informado kaj imiti ĉi tiun simplan vojon.

I N F O R M E J O

Vi demandas — ni respondas

ĈU oni povas kolekti informojn pri la monumentoj, memortabuloj, muzeoj kaj stratoj de Zamenhof en la tuta mondo?

Respondo: Statistikon pri Zamenhof-stratoj kaj similaj de tempo al tempo faras nia Centro de Esploro kaj Dokumentado. Laste ĝi eldonis liston A/V/3 en 1966, kiel CED-dokumenton. Ankaŭ en la verko *Doktoro kaj lingvo Esperanto* de A. Holzhaus (1969) aperis tiutemaj listoj.

KIU ŜI ESTAS?

Ĝenerale la desegnistoj de konstantaj rubrikoj ne havas okazon sin prezenti, des pli kiam ili uzas nur la inicialojn de sia nomo en siaj desegnaĵoj.

Certe niaj legantoj jam scivolas, kia homo estas la konstanta desegnist(in)o, ĉefe de la rubriko "Komenco bona — ĉio bona", kiu uzas la inicialojn "LA".

Ni diru, ke tiu estas "ŝi". Ŝi nomiĝas Lukács Agnes, naskiĝinta en Budapeŝto en la jaro 1920.

Finstudinte en la Hungara Akademio de Belartoj kaj instruante ekde 1945 desegnadon kaj arto-historion en lernejo, ŝi eklernis Esperanton en la jaro 1956 de s-ro Ludoviko Kőkény kaj kunlaboris kiel desegnistino por la revuoj *Hungara vivo, La praktiko* (de UEA) kaj *Esperanto,* por kiu lasta ŝi sindediĉe daŭrigas la kunlaboron. Kiel artistino, ŝi partoprenis plurajn ekspoziciojn de artaĵoj kaj mem organizis personan ekspozicion.

Dankante al f-ino Lukács pro ŝia agrabla kunlaborado, ni deziras al ŝi pluajn sukcesojn en sia fako kaj por nia movado.



KONGRESI UNUE EN JUGOSLAVIO

Kotiztabelo post la 1a de aprilo 1973 gld.

1.	Kongresano ne membro individua de UEA . .	108,–
2.	Kongresano indiv. membro kun Jarlibro (MJ) .	93,–
3.	Kongresano individua membro (MA)	78,–
4.	Edz(in)o de kongresano en kategorio 1 . . .	75,60
5.	Edz(in)o de kongresano en kateg. 2 aŭ 3 . . .	63,–
6.	Junulo ĝis inkluzive 20-jara	32,40
7.	Universitata studento ĝis inkl. 30-jara	54,–
8.	Blindulo	43,20

Aperis dua oficiala bulteno

Ĉiuj kongresaliĝintoj jam ricevis la duan oficialan bultenon. Tiu ĉi 32-paĝa broŝuro estas kolekto da ĝeneralaj informoj, mapoj kaj fotografaĵoj pri diversaj kongresaj aktivecoj, akompanata de mendiloj por loĝado, ekskursoj, bankedo kaj la postkongreso.

Fervoja rabatilo denove en Esperanto

Kiam en 1971 por la unua fojo aperis klarigaj tekstoj sur la fervoja rabatilo ankaŭ en Esperanto, oni povis esperi pri bona precedenco. Efektive, ĉi-jare la jugoslava fervojo sekvis la ekzemplon, kaj tiamaniere kongresanoj ricevos esperantlingvan rabatilon por la dua fojo en la historio.

Ĉu ne pli da infanoj?

Ĝis la finredakto de tiu ĉi komuniko venis nur 21 aliĝoj por la 13a Internacia Infana Kongreseto 1973 en Beograd. Laŭlanda superrigardo aspektas jene: Jugoslavio 8, Britujo 3, Italujo 3, Japanujo 2, Grekujo 2, Danlando 2 kaj Usono 1. Ĉu ne ekzistas pli da interesitaj infanoj? Certe jes!

Filmoj por la filmvespero


Anoncoj pri esperantlingvaj filmoj konvenaj por dumkongresa prezentado estas bonvenaj ĉe la respondeculo s-ro Petrović, p/a LKK 58a UK, Terazije 42, YU-11000 Beograd, Jugoslavio.

Kongresa glumarko en la kongreslando

El la tuta eldonkvanto de la kongresaj glumarkoj plenaj du-trionoj jam vendiĝis en Jugoslavio mem. Tia populareco necesigis reeldonon de pliaj 30 000 glumarkoj. Prezo por 10-marka folio estas 0,50 gld. (1 internacia respondkupono); por Nederlando 0,57 gld. + sendokostoj 10%.

Bankedo en Metropol

La oficiala bankedo de la Kongreso okazos en la luksa hotelo "Metropol", tre proksime de la kongresejo. La menuo konsistos el diversaj varmaj kaj malvarmaj pladoj, inter ili jugoslavaj specialaĵoj, trinkaĵoj kaj aliaj bongustaĵoj. La prezo estos 25,– gld. (150 n. din.) por ĉiu persono.



La fama Akropolo en Ateno, Grekujo.

Du pliaj karavanoj

Allogan programon promesas organizantoj de la belga karavano al Beograd (G. Maertens, Prins Leopoldstraat 51, B-8310 Brugge, Belgujo). Por skandinavaj esperantistoj ekzistas ankaŭ plia ebleco: trisemajna aŭtobusvojaĝo sub la organizo de la turisma servo de N.E.L., Boks 942, Oslo sentrum, Norvegujo.

Informvesperoj pri Jugoslavio


Por la Esperanto-gazetoj, radiostacioj kaj la lokaj grupoj, kiuj preparas informadon pri la kongresa lando, estas je dispono pretaj koncizaj artikoloj. Oni povas skribi al S-ro M. Gjivoje, P.p. 5025, YU-41040 Zagrebačka Dubrava, Jugoslavio, aldonante internacian respondkuponon.

Feriorestado en Primoŝten

Internacia Kultura Servo (Amruševa 5, YU-41000 Zagreb) anoncis organizon de 7-taga kultura feriado en la Esperanto-kampadejo de Primoŝten, de la 6a ĝis la 13a de aŭgusto 1973. La kompleta prezo estas 40 usonaj dolaroj aŭ, inkluzive de la vojaĝo el Beograd, 63 usonaj dolaroj.

Nova peranto en Finnlando


En Finnlando transprenis la oficon de la kongresa peranto S-ro Harri Laine, Toraihaukant. 8 A 19, SF-02620 Karakallio, Finnlando.
Ŝanĝiĝis ankaŭ la oficiala kontaktadreso por Hunga-



EN GREKUJO

AMPLEKSA TURISMA PROGRAMO


estas jam anoncita por la Oficiala Postkongreso en Ateno, okazonta de la 5a ĝis la 12a de aŭgusto, t.e. tuj post la Universala Kongreso en Beograd. Plenaj detaloj jam aperis en la Oficiala Bulteno de la Universala Kongreso, kune kun mendilo por sinanoncoj. Se la ĉi-paĝaj bildoj jam vekis vian vojaĝemon, sufiĉos provizore nur kelkaj aludoj: al teatra vizito (grekaj dancoj), tuttaga ŝipkrozado al proksimaj insuloj, solena akcepto fare de la Ministerio pri Civilizacio, kompreneble ankaŭ vizito al Akropolo kaj aliaj monumentoj. Ĝis revido en Ateno?



Mikine, Grekujo.



Malnova domo en Metsovon, Grekujo.



rujo: Hungara Esperanto-Asocio, Poŝtkesto 193, H-1368 Budapest 5.

Ekskursa programo

Aparte bunta estas ĉi-jare la oficiala ekskursa programo. Krom enurbaj rondvojaĝoj la LKK elektis 6 diversajn celojn por la tuttaga ekskursado je ĵaŭdo, la 2a de aŭgusto 1973. Detaloj aperas en la Oficiala Bulteno.

Pedagogoj kunvenos en Maribor

La 7a Kunordiga Konferenco por enkonduko de Esperanto en lernejojn kaj la Internacia Instruista Konferenco de ILEI okazos de la 18a ĝis la 27a de julio 1973 en Maribor. Adreso de la organiza komitato estas: Tomanova ul. 19, YU-62000 Maribor, Jugoslavio.

Statistiko (1973-03-20)

Argentino 1, Aŭstralio 10, Aŭstrujo 16, Belgujo 27, Brazilo 3, Britujo 71, Bulgarujo 23, Ĉeĥoslovakujo 4, Danlando 11, Egiptujo 2, Finnlando 28, Francujo 124, FR Germanujo 67, Grekujo 3, Hindujo 1, Hispanujo 32, Hungarujo 9, Islando 2, Israelo 4, Italujo 62, Japanujo 30, Jugoslavio 88, Kanado 16, Koreujo (Suda) 5, Meksiko 3, Nederlando 72, Norvegujo 11, Nov-Zelando 3, Pollando 16, Portugalujo 4, Rumanujo 2, Sovetunio 9, Svedujo 43, Svisujo 10, Turkujo 1, Usono 83, Venezuelo 1.

Entute 897 aliĝintoj el 37 landoj.

I.J.K.

Foto-konkurso: "Jen ĝi estas la hom-medio"

Okaze de la 29a Internacia Junulara Kongreso de TEJO, kies ĉefa temo estas "Junularo kaj la hom-medio", la Universitata Esperanto-Klubo de Sarajevo en kunlaboro kun la loka Akademia Foto-Klubo organizas internacian foto-konkurson sub la temo "Jen ĝi estas, la hom-medio". La konkurson povas partopreni ĉiu foto-amatoro, ankaŭ ne-esperantista; limdato por la akcepto de la fotoj, kiuj minimume havu la formaton de 24 x 30 cm, estas la 1973-07-01; estos belaj premioj por la plej bonaj verkoj, kiuj krome ekspoziciiĝos dum la IJK; detalajn informojn donos la preparkomitato de la IJK: V. Pelagića 8/I, YU-71000 Sarajevo, Jugoslavio.

Kongreskotizoj neŝanĝitaj

Kvankam devalutiĝis la usona dolaro, la kongreskotizoj restas neŝanĝitaj, t.e. ekde la dato 1973-04-01:

membroj de UEA/TEJO sub 20 jaroj: 33 $
20-25 jaroj: 36 $
pli ol 25 jaroj: 39 $

La prezoj por nemembroj estas po 3 $ pli altaj.

Aliĝiloj kaj ĉiuj interesaj informoj estas daŭre haveblaj ĉe la preparkomitato (adreso supre).

OKTOBRA FESTO EN IVANOVO (SOVET-UNIO)

Okazis sukcesa renkontiĝo de sovetuniaj gejunuloj dum oktobraj festoj en Ivanovo, kiun partoprenis esperantistoj el diversaj partoj de la lando. Dum tritaga interkomunikiĝo okazis multaj Esperantaj aranĝoj; krom honorigon de meritaj veteranoj de lokaj Esperanto-movadoj, oni aranĝis pedagogian seminarion, montris Esperante sonigitajn kino-filmojn, aranĝis "vesperon por gajuloj kaj konjektemuloj", ekspozicion de esperantaĵoj, grandan bankedon, ekskursojn, improvizitajn teatraĵojn, konkursojn kaj adiaŭan balon en la Ivanova Pedagogia Instituto, dum kiu oni elektis lokan belulinon "fraŭlino Esperanto"; ĉiuj tiuj aranĝoj estis de ideale alta lingva, bonorda kaj amikeca nivelo kaj sendube faris bonan impreson al ĉiuj ĉeestantaj gejunuloj.



J.E.L.I. EN LA ISRAELA TELEVIDO

La 8-an de januaro ĉi-jare, la junulara sekcio de TEJO en Israelo, JELI, ĝuis grandan sukceson. Per sia brua agado ili kaptis atenton de la koncernaj televidaj instancoj kaj tiel atingis ok-minutan intervjuon en la nacia televido, enkadre de "Duono por junularo", programo por la gejunuloj kaj iliaj interesoj kaj aktivecoj; intervjuiĝis f-ino Anat Zduńska, estraranino de JELI, kaj du junaj kursanoj 17- kaj 18-jaraj; tiu triopo sukcesis elektrizi la landon, kaj nun daŭre atingas la esperantistojn aro da informpetoj pri la kursoj kaj aliaj detaloj.

Dua ĝojiga novaĵo el Israelo: f-ino Anat Zduńska sukcesis finpretigi la unuan korespondan kurson de Esperanto en la hebrea lingvo, kaj jam la libro presiĝas!

KLUBAJ AKTIVECOJ EN ARGENTINO

Ankaŭ post la fino de sia kurso, la junaj klubanoj en Firmat (Argentino) daŭrigas siajn regulajn kunvenojn sub gvido de la organizanto, d-ro Rubén Feldman González. Regule ili kunsidas ĉiumarde vespere de la 9a ĝis la 11a horo en la klubejo, por paroli nur Esperante tie.

Oni interŝanĝas ankaŭ vizitojn kun aliaj kluboj; antaŭ nelonge deko da membroj de Esperanto-Klubo de Firmat vizitis la urbon Casilda por informi pri Esperanto kaj subteni kaj plivigligi la tiean lokan rondon. Ili daŭrigas la varban kampanjon per posta vizito al Santa Fe, kie rezultiĝis vigla kunveno kaj estis pluraj prelegoj kaj interŝanĝiĝis opinioj pri kunlaboro inter la diversaj regionaj kluboj.

LABORO EN SVISLANDO

Ofte junaj esperantistoj vane serĉas laborpostenojn eksterlandajn, kiuj ebligu al ili restadon eksterlandan, — simple preskaŭ neniam ili sukcesas trovi taŭgan lokon kun almenaŭ iel adekvata pago. Nun estas granda internacia kliniko en Svislando, kie laboras pluraj esperantistoj, kiuj kompreneble klopodas havigi al si kiel novajn kolegojn aliajn junajn esperantistojn — tamen senrezulte! Ne estas tiel, ke devus esti science edukitaj flegistoj. Povus esti junulo aŭ junulino, lernanto aŭ studento, kiu ferius por du, tri aŭ pli da monatoj, kaj dum tiu tempo pretus/ŝatus pasigi siajn feriojn laborante en tia medio, kontraŭ kontentiga pago! Estas mirinde, ke ne troviĝas kandidatoj por tio. Eventualaj interesitoj turnu sin al la TEJO-redaktoro.

MORTINTA ASOCIO DAŬRE VIVAS KAJ AKTIVAS

En la 1972a novembro okazis la kutima junulara aranĝo en Japanujo: "Aŭtuna kunloĝado de TEJA", kiel ĉiujare, zorge organizita de tokiaj junularaj aktivuloj. Ĉi-foje 62 gejunuloj kunvenis por vivi dum 3 tagoj en Esperantujo. Oni enkondukis novan sistemon al la lecionoj, t.n. "paro"-sistemon, laŭ kiu po unu gvidanto instruas al po unu lernanto. La sistemo baziĝas sur la ideo, ke ja ankaŭ la progresintoj plej bone lernas, mem instruante, tiel do mem devigataj refoje lerni ĉion antaŭ ol prezenti ĝin al komencanto. Krom la kursoj estis prelegoj, seminarioj kaj gajaj kunsidoj.

TEJO

TEJO-redaktoro
G. D. Winkler,
Jaegerstr. 27,
D-42-Oberhausen-Sterkrade,
F. R. Germanujo

Redaktoro: E.L.M. Wensing
Postbus 72, Valkenswaard NB, Nederlando

EL LA 10 DEVOJ DE LA ESPERANTISTO

10. Por Esperanto kiel movado agu; por ĝi kiel realaĵo pagu, kaj kiel altan idealon konservu ĝin en via koro.

Unu el la difinoj, kiujn P.I.V. (Plena Ilustrita Vortaro) donas por la vorto "movado" estas: Tuto de la agado de iu organizo por atingi difinitan celon.

Kio estas tiu difinita celo, kiun la Esperanto-movado volas atingi? Laŭ la statuto de U.E.A. ĝi estas: disvastigi la uzadon de la Internacia Lingvo Esperanto kaj plifaciligi la *ĉiuspecajn* spiritajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj, sen diferenco pri nacieco, raso, religio, politiko aŭ lingvo.

Verŝajne ĉiu, kiu lernis Esperanton, havis por tio siajn personajn motivojn. Unuj studis la lingvon el scivolemo, aliaj el idealismo. Multaj lernis la lingvon por tiel povi kontakti pli facile kun homoj en fremdaj landoj. Multaj esperantistoj utiligas la lingvon por kontentigi siajn privatajn *hobiojn* (kolektado de bildkartoj, poŝtmarkoj, fremdlandaj moneroj, ktp.). Tamen, la ĉefa celo de ĉiu esperantisto devas esti kaj resti: agadi por la disvastigo de Esperanto, kiel la plej taŭga ilo por solvi la lingvan problemon en la mondo. Tiu komuna laboro ligas nin ĉiujn; ĝi *konsistigas* la "Movadon".

Nia movado konsistas el homoj de plej diversaj rasoj, religioj, politikaj konvinkoj, el homoj apartenantaj al plej malsamaj lingvo-grupoj. Sekve estas logike, ke en tia *bunta* diverseco kelkfoje *ekestas* problemoj, eĉ gravaj malkonsentoj, pri la metodoj *aplikendaj* kaj la vojoj *irendaj* por realigi nian komunan celon.

Neniu persono en la Esperanto-movado posedas la monopolon de absoluta, nekontestebla ĝusteco, kaj tio, kion unu konsideras treege grava, ofte ŝajnas al alia bagatelo aŭ afero *duaranga.*

En movado kiel la nia *manifestiĝas* ĉiaj tendencoj. Neniu esperantisto povas simpatii kun ĉiuj celoj, programoj, principoj kaj laboroj, kiuj *disvolviĝas ene de* la Esperanto-movado. Por eviti la disfalon de U.E.A. pro politikaj, religiaj aŭ aliaj tendencaj *kvereloj,* U.E.A. observas striktan neŭtralecon. *Tiurilate* la statuto diras: U.E.A. estas neŭtrala rilate al nacieco, raso, religio, politiko kaj sociaj problemoj.

Nur tiel estas eble kunligi kaj kunlaborigi en la kadro de U.E.A. homojn de plej kontrastaj viv-konceptoj.

Iomete *kontraŭdira* en la 10a devo estas la konsilo "ke oni pagu por ĝi (ĝi = Esperanto) kiel realaĵo kaj ke oni konservu ĝin (ĝin = Esperanton) en la koro kiel idealon". "Idealo" estas alta stato de perfekteco, kiun oni neniam plene atingas, dum "realaĵo" estas "aĵo atingita", do io jam realigita. La Esperanto-movado estas realaĵo, kaj por ĝi oni pagu, por ke ĝi povu plue ekzisti kaj aktive agadi.

La idealo (ke iam venu la tago, kiam ĉiuj rekonos Esperanton kiel la plej akceptindan solvon por la lingvo-problemo en la mondo) restu en via koro, kaj vi klopodu, per ĉiuj viaj fortoj, almenaŭ parte realigi ĝin. Por la esperantistaro la plej granda sukceso estos, kiam Esperanto ne plu estos idealo.

Klarigoj:

ĉiu-spec-a: adjektivo, derivita de "de ĉiuj specoj" (ĉia-j).

hobi-o: nova vorto (= neologismo), de la angla vorto "hobby", signifanta: ŝat-okupo, laboro, ludo, studo ktp. per kiu oni ŝatas okupi sin kaj pasigi sian liberan tempon. (Por mi ludi ŝakon estas hobio, ne profesio).

konsist-ig-i: agi, fari, tiel ke io konsistu; estigi.

bunt-a: multkolora (ŝi portis buntajn vestojn). Bunta homamaso (amaso de plej diversaj homoj).

ek-est-i: komenci esti, estiĝi, naskiĝi (metafore).

aplik-end-a

ir-end-a: la sufikso "end-" indikas, ke io devas esti (far-) ata. Tiu metodo estas prefere aplikenda = Kun prefero oni apliku tiun metodon (por atingi plej bonan rezulton). Se vi volas atingi sukceson, vi iru laŭ tiu vojo = Tiu vojo estas irenda. Distingu bone inter "enda" kaj "ota"! La laboro estas farota = Oni (nepre) faros tiun laboron. La laboro estas farenda = La laboro devas esti farata, sed ne estas certe, ke oni efektive faros ĝin.

du-a-rang-a: adjektivo, derivita de "de dua rango" (komparu: dufoje kaj duafoje, unuvice kaj unuavice).

manifest-iĝ-i: manifesti = vidigi, proklami, aperigi. Manifestiĝi = klare videbliĝi, fariĝi evidenta.

dis-volv-iĝ-i: sin disvolvi (en ĉiujn direktojn), evolui, kreski malrapide, dise. (La rozo disvolviĝas bela).

en-e de: en la interno de, en la sino de.

kverel-o: malpaco, varmega disputo.

tiu-rilat-e: adverbo, derivita de "en tiu rilato".

kontraŭ-dir-a: kiu (kio) argumentas kontraŭ sin mem.



****

"Vi do volas fariĝi mia bofilo, sinjoro?"
"Absolute ne, sinjorino. Sed, se mi volas edziĝi al via filino, tio ja estos absolute neevitebla."



ESPERANTO EN RADIO

Ĉiujn informojn pri radio sendu al s-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, F-75016 Paris, Francujo. En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa Tempo oni aldonu unu horon. Aliajn horsistemojn vidu en la Jarlibro 1972, Dua Parto, p. 338. Mallongigoj: I = Informoj; P = parolado ; K = Kurso.

Ĉiutage

05.00-05.30 Warszawa, 200 m (1502 kcs), 50.04 m (5995 kcs), 48.90 m (6135 kcs). 41.27 m (7270 kcs). I.P. Pola Radio, Esperanto-Redakcio, Poŝtokesto 46, Warszawa, Pollando.

15.30-16.00 Warszawa, 41.99 m (7145 kcs), 31.45 m (9540 kcs), 31.01 m (9675 kcs).

Dimanĉe

10.30-11.00 Muritiba, 190 m (1580 kcs). I.K. Soc. Em. Radiovox, Muritiba (Bahia), Brazilo.

11.00-11.30 Pekino, 72.63 m (4130 kcs), 57.40 m (5220 kcs), 47.69 m (6290 kcs), 40.18 m (7470 kcs). I. Radio Pekino, Esperanto-fako, Pekino, Ĉinujo.

12.30-13.00 Pekino, 86.43 m (3500 kcs), 71.43 m (4200 kcs), 54.10 m (5545 kcs), 25.04 m (11980 kcs), 19.89 m (15080 kcs). I.

20.00-20.20 Roma, 41.24 m (7275 kcs), 30.90 m (9710 kcs), 25.42 m (11800 kcs). P. Radio Roma, Esperantofako, Casella postale 320, I-00100 Roma, Italujo

20.05-20.30 Sofia, 50.62 m (5920 kcs). P. Radio Sofia, Bulgarujo.

22.45-23.00 Valencia, 358 m (836 kcs). P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanujo.

23.30-23.55 Sofia, 49.42 m (6070 kcs), 31.38 m (9560 kcs). P.

Lunde

00.00-01.00 Sorocaba, 278 m (1080 kcs). I.K. Rádio Clúbe de Sorocaba, rua São Bento, Sorocaba (São Paulo), Brazilo.

12.00- 12.15 Gdańsk, 66.29 Mcs (mod. frekv.). Ripeto de la antaŭa vendreda programo el Warszawa. (ĉiun alternan lundon).

12.20-12.30 Bern, 75.28 m (3985 kcs), 48.66 m (6165 kcs), 31.46 m (9535 kcs), 19.44 m (15430 kcs), 16.86 m (17795 kcs), 13.94 m (21520 kcs), 13.90 m (21585 kcs). P. (d-ro A. Baur), Svisa Radio, SOC, CH-3000 Bern 16, Svislando.

Marde

16.45 – 17.00 Bratislava, 68.84 Mcs (mod. frekv.) kaj aliaj stacioj 67.94 Mcs, 69.20 Mcs, 69.50 Mcs, 69.68 Mcs. K. Radio Bratislava, Leninplaco 13a, Bratislava 1, Ĉeĥoslovakujo.

Merkrede

12.20-12.30 Bern, kiel lunde (s-ro Gacond).

13.00-13.15 Wien, 203 m (1475 kcs). P. Radio Wien, Esperanto-elsendo, Argentinierstr. 30a, A 1041 Wien, Aŭstrujo. (Ĉiun kvaran sinsekvan merkredon.)

19.30-19.45 Sabadell, 203 m (1475 kcs), 89.1 Mcs (mod. frekv.). I.K. Radio EAJ 20, Sabadell, Hispanujo.

Ĵaŭde

16.35-16.50 Bratislava, kiel marde.

21.45-21.55 Bern, 75.28 m (3985 kcs), 48.66 m (6165 kcs), 31.46 m (9535 kcs), 31.28 m (9590 kcs), 25.60 m (11720 kcs), 25.27 m (11870 kcs), P. (d-ro Baur).

23.05-23.20 Zagreb, 264 m (1163 kcs). P. Radio Zagreb, Jugoslavio.

Vendrede

18.30-19.00 Clermont-Ferrand, 90.4 Mcs (mod. frekv.). K. Centre de Télé-enseignement de la Faculté des Lettres, 29 bd. Gergovia, F-63 Clermont-Ferrand, Francujo.

20.00-20.30 Pekino, 58.20 m (5162 kcs), 47.84 m (6270 kcs), 47.61 m (6300 kcs), 45.38 m (6610 kcs), 44.00 m (6825 kcs), 31.98 m (9380 kcs). I.

23.10-23.25 Warszawa, 1321 m (227 kcs), P. Programo preparita de Pola Radio, ul. Uphagena 1, Gdańsk-Wrzeszcz, Pollando. (ĉiun alternan vendredon).

Sabate

11.00-11.30 Pekino, kiel dimanĉe.

12.30-13.00 Pekino, kiel dimanĉe.

20.00-20.30 Pekino, kiel vendrede.

21.45-21.55 Bern, kiel ĵaŭde (s-ro Gacond).

RADIO WARSZAWA krom la ĉi-supre anoncitan ĉiutagan programon prezentas "Anguleton por esperantistoj": 1) dum la germanlingvaj programoj dimanĉe de 21.00 h ĝis 21.30 h per ondoj 49 m, 41 m, 31 m; 2) dum la svedlingva programo marde de 16.00 h ĝis 16.30 h per ondoj 200 m, 49 m; 3) dum la danlingva programo dimanĉe de 20.00 h ĝis 20.30 h per ondoj 49 m, 41 m. La anguletoj estas kelkminutaj kaj pritraktas nur Esperanto-temojn.

ĜENERALA AŬDEBLECO

a) stacioj nur loke aŭdeblaj (nur en la lando mem, kelkaj nur en la urboj): Bratislava (ankaŭ en eksterlandlimaj regionoj), Clermont-Ferrand, Muritiba, Sabadell, Sorocaba;

b) stacioj aŭdeblaj en Eŭropo kaj ĉirkaŭmediteraneaj landoj: Bern (75.28 m, 48.66 m, 31.46 m), Pekino (vesperaj elsendoj vendrede kaj sabate), Roma, Sofia, Valencia (en suda Eŭropo), Warszawa, Wien (aŭdebla en centra Eŭropo), Zagreb.

c) stacio aŭdebla en Azio kaj Ameriko: Pekino (dimanĉe kaj sabate je 11.00 kaj 12.30 GMT);

ĉ) stacio aŭdebla en Afriko: Bern (25,60 m, 25.27 m, 19.60 m, 19.44 m, 16.86 m, 13.94 m, 13.90 m).

Tio estas nur ĝenerala skizo, variigebla laŭ modelo de la ricevilo, atmosfera kondiĉo, lokaj cirkonstancoj diversspecaj.

OFICIALA INFORMILO

N-ro 466, 1973-03-01

POŜTAJ KODNUMEROJ

Ĉiam pli da landoj nuntempe enkondukas kodnumerojn en la poŝtajn adresojn por faciligi la aŭtomatan traktadon de poŝtaĵoj. La Centra Oficejo deziras danki al ĉiuj membroj, kiuj sendis kaj sendas informojn pri tiuj kodnumeroj por la kompletigo de siaj adresoj. Ĝi tamen petas la membrojn kompreni, ke ne estas eble tuj kompletigi milojn da adreskliŝoj, ĉar tio postulus tro da tempo kaj mono. La kompletigajn informojn la C.O. zorge notas kaj aldonos al la adreskliŝoj iom post iom laŭ siaj eblecoj.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Hagemann, Ole, Danlando.
Engeländer, G., F.R. Germanujo.
Beckford, C.S., Sud-Afriko.
Hjelm, Roland, Svedujo.
Nygård, G. A., Svedujo.
Morey, D.R., Usono.

NOVAJ MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1973

108 S. Stamm, Aŭstrujo. 109 A. Degryse, 110 Van Ginderen-Martens, Belgujo. 111 D.P. de Souza, 112 R. P. de Melo, 113 C.H. Dionísio, 114 A.J. Vaz, Brazilo. 115 G.B. Atkinson, 116 W.G. Atkinson, 117 S.E. Bellatti, 118 E.P. Crabtree, 119 M.J. Hockey, 120 D. Kennedy, 121 Kenneth A. Sly, 122 E.J. Laurie, 123 R. Murray, 124 H.K. Phelan, 125 P.C. Sinclair, 126 B. Spiller, 127 D.H. Withey, Britujo. 128 A. Blume, 129 E. Hansen, Danlando. 130 N.G. Narvala, 131 T. Tähtinen, Finnlando. 132 J.P. Beau, 133 P. Chantereau, 134 G. Dalichampt, 135 Foyer Culturel d'Espéranto, Francujo. 136 L. Beaucaire, 137 L. Bechtold, 138 H. Bily, 139 E. Fritsch, 140 M. Gründler, 141 B. Hasecke, 142 J. Holtmann, 143 T. Kraft, 144 H. Köhne, 145 M. Murath, 146 M. Schumacher, 147 H. Wagner, 148 W. von Waldowski, 149 H. Wehrheim, 150 H. Wietrzynski, 151 H.P. Wuenschel, F.R. Germanujo. 152 C. Tranque, Hispanujo. 153 A. Casetta, 154 A. Lacalendola, 155 L. Minnaja, 156 R. Sgroi, 157 L. Terrazzani, Italujo. 158 W.R. Harmon, 159 S. Crnič, Jugoslavio. 160 B.D. Kaneen, 161 H.J. Lewis, 162 J. Courtney White, Kanado. 163 H. Vázquez Briones, Meksiko. 164 A.B.M. Coppens-Brink, 165 J. Kroon, 166 H.C. Luyke, 167 G.J. Rodenhuis-Boll, Nederlando. 168 G. Ringstad, Norvegujo. 169 R.J. Clarkson, 170 V.I. Curry, 171 G.D. Dewar, 172 W.D. Harding, 173 D.J. Langman, 174 A.G. Wiltshire, Nov-Zelando. 175 J. O'Shea, Sud-Afriko. 176 I. Andersson, 177 M. Ahlström, 178 K. Axelsson, 179 M. Colliander, 180 E. Dahl, 181 O. Engholm, 182 Gunnel Fejde, 183 M. Fejde, 184 K. Gustafsson, 185 H. Hàkansson, 186 A. Johansson, 187 E. Johansson, 188 H. Karlsson, 189 D. Kullberg, 190 L. Lagerkrantz, 191 V. Lidell, 192 E. Lind, 193 T. Lindberg, 194 Å. Näsholm, 195 R. Nordström, 196 G. Nylin, 197 O. Olsson, 198 G. Persson, 199 O. Persson, 200 B. Sandelin, 201 B. Sedendahl, 202 K. Sehlstedt, 203 A. Snarberg, 204 J. Snarberg, 205 K. Stridell, 206 E. Sundborg, 207 S. Szabad, 208 A. Wedholm, Svedujo. 209 Berger-Kreth, Svislando, 210 M. d'Estries, 211 A.H. Fournier, 212 D. Jagerman, 213 D.C. Jones, 214 D. Mason, 215 L.H. Maury, 216 P.E. Nace, 217 R.R. Neri, 218 W.C. Nelson, 219 S. Raia, 220 W.P. Simpson, 221 B. Werny, Usono.

NOVAJ DELEGITOJ

Konforme al la artikolo 11 de la Ĝenerala Regularo de UEA ni publikigas ĉi-sube la nomojn de nove nomitaj delegitoj de UEA. Se ĝis la dato 1973-06-15 neniu membro protestos pro grava kaŭzo, la nomado fariĝos valida.

Brazilo: Helio F. Aderne, FD Belo Horizonte, Antônio A. Corgosinho Filho, FD Belo Horizonte; Aderaldo Rocha, D kaj FD Itabuna. **Danlando:** Jørn Slottboe, D kaj FD Ringsted. **Francujo:** Georges Raffin, D Aix les Bains; Henri Journet, VD kaj FD Dijon; Colette Faucher, FD Gap; Jean Got, FD Gap; Marcel Berthier, FD Pont-de-Beauvoisin; Jean Yves Fromentoux, D kaj FD Vitre. **F.R. Germanujo:** Franz Schneider, D kaj FD Olpe. **Israelo:** Erna Ben-Haim, FD Tiberias. **Japanujo:** Bun-iĉi Iŝizaki, FD Kumamoto; William R. Harmon, FD Tokyo; Katsuo Kunii, FD Yamagata. **Nederlando:** Hans Wijmer, FD Den Haag. **Nov-Zelando:** Peter R. Walker, D kaj FD Hastings. **Pollando:** Roman W. Rutkowski, FD Bydgoszcz; Marian Dobrzyński, FD Warszawa; Mirosław Wiechowski, FD Warszawa. **Ruando:** José Jacob, D Kigali. **Sovet-Unio:** Leonid Grig. Kapustin, D kaj FD Gorjkij. **Usono:** George H. E. Lockhart, VD kaj FD Detroit; Doris Vallon, FD Foster City; George H.E. Lockhart, D Northville; George Rodenborn, FD Oakland; Virginia Bartmess, FD Portland; Doris Vallon, FD San Francisco. **Zairo:** Ngangu Nduantoni Bakidila, Lukala.

NE PLU VALIDAS (en Jarlibro 1972, Unua Parto, pro adreŝanĝoj aŭ aliaj kaŭzoj)

Brazilo: Coronel Fabriciano, Rio de Janeiro (FD lingvistiko, psikologio: para-, religio: katolikismo), São Paulo (FD edukado). **Finnlando:** Helsinki (FD astronomio). **Francujo:** Le Pecq, Saint-Avold. **F.R. Germanujo:** Bredelar. **Hispanujo:** Barcelona (FD komerco: oficejaj aĵoj). **Jugoslavio:** Sarajevo (FD studentaj aferoj). **Nederlando:** Bergen (FD juro), Bloemendaal. **Ruando:** Butare. **Usono:** Bethany, Hopewell Junction.

Anoncetoj

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,50 gld. (t.e. 1 internacia respondkupono). Pri la enhavo de la anonc(et)oj respondecas sole nur la anoncantoj.

La 3-a Amikeco-Kongreso en la Kastelo Grésillon, Francujo, okazos la 19-an kaj la 20-an de majo 1973, en varma etoso. Petu informojn de la organizanto: Pierre Delaire, B.P. 901, F-45010 Orléans, Francujo.

"Aktiveco de la monato" estas la nova, premgrupa agado, kiu post nur kelkaj monatoj jam kolektis celkonsciajn kunlaborantojn en 24 landoj. Ĉu ankaŭ vi deziras envicigi vin en tiun ĉi gravan laboron por Esperanto? Se jes, bv. skribi al Inter-grupo, Box 55028, S-400 53 Gotenburgo 55, Svedio.

Por ekspozicioj en universitatoj petas materialojn Esperanto-Instituto en Guk-Je Universitato, N-ro 2-2-2, Ĉungjung-Ro, Sodemun-gu, Seŭlo, 120, Suda Koreujo.

Christopher Wood, 47, Sandownroad, Crewe, Cheshire, Anglujo, deziras tutmondajn gekorespondamikojn.

Por kuraĝigi junajn komencantojn bonvolu amase sendi P.K. kaj esperantaĵojn, por ekspozicio en junio, al CES, Châteaubriand, F-22130 Plancoët, Francujo.

25-jara brita juristino deziras korespondi kun geesperantistoj. F-ino Christine Birnie, St. Andrews, Condor Road, Laleham, Staines, Middlesex, Anglujo.

Sendu 200 poŝtmarkojn al mi, mi sendos 200 el Nordeŭropaj landoj al vi. Werner Moursund, N-8700 Nesna, Norvegujo.

Oficistoj serĉataj por ĉirkaŭ ses monatoj, parolantaj Esperanton kaj anglan, kapablaj maŝinskribi. Adreso: Esperanto-Asocio de Bilbao, Barrencalle-Barrena, Bilbao, Hispanujo.

Korespondant(in)o japana aŭ alia pri "Ikebana" aŭ alia flora arto. S-ino M. Williams, 9, Oulton Avenue, Chester, CH2 1QY, Britujo.

"Univox" – praktikaj kursoj en Esperanto kaj 22 aliaj lingvoj – troviĝas sur diskoj (tonkartoj) aŭ kasetoj C-60. (Kasetoj nun riceveblaj ankaŭ por aliaj lingvoj ol Esperanto!) Paralelaj tekstoj ebligas 506 kombinaĵojn. Ordinara sonbendo, 9,5 cm/sek., nur en Esperanto. Petu informojn: INTER-grupo, Box 55028, S-400 53 Gotenburgo 55, Svedio. Telefono: (031) 48 95 97.

Korespondi deziras Adil Hamodah Hani, Suq-Al-shyokh, Irako. 30-jara. Nenion kolektas.

Radio-bulteno n-ro 4 estas preta. Artikoloj pri Esperanto en Radio, televiziaj satelitoj, konsiloj kaj sugestoj. Prezo (inkluzive jaran kotizon kaj 20 poŝtkartojn) 5,20 skr aŭ 6 rpk. Inter – Societo por la Internacia Lingvo en Radio, Box 55028, S-400 53 Gotenburgo 55, Svedio. Sveda poŝtĉekkonto: 42 66 60-7.

Universala Invalida Esperanto-Asocio, Box 5, Strib, DK 5500 Middelfart, Danlando, deziras kontakti ĉiujn invalidojn kaj kriplulojn de la tuta mondo. Skribu por nia bulteno.

La dolĉa Franclando estu en ĉiu esperantista biblioteko! Romantika, riĉa kaj ĉarma 128-paĝa luksa libro kun 69 ilustraĵoj. Broŝurita: 28 fr. fr. afr. aŭ: 38 fr. fr., bindita. Mendu ĉe la aŭtoro: Pierre Delaire, B.P. 901, F-45010 Orléans, Francujo. Poŝta ĝirkonto: 271-69 La Source.

Por fine venki kaj tiel certigi al la esperantistaro ankoraŭ unu konstantan programon en la Internacia Lingvo, vi estas insiste petata skribi al Radio de Svedio. Ĝuste nun grava reorganizado de la programa agado kaj samtempa funkciigo de novaj, fortaj sendiloj povas favori al Esperanto, kondiĉe ke vi skribas kaj petas programojn. Skribu nun al la nova direktoro de la koncerna fako, referencante al Inter – Agadgrupo por Esperanto. Jen lia adreso: S-ro Bengt Gustafsson, Dir. de Progr. por eksterlando, S-105 10 Stokholmo, Svedio.

Ludoviko en Nederlando, supera kurslibro por franclingvanoj, multe progresigos vin. Prezo afr.: 35 fr.fr. Ĉe la aŭtoro: Pierre Delaire, B.P. 901, F-45010 Orléans, Francujo. Poŝta ĝirkonto: 271-69 La Source.

Letervesperon aranĝos 11.4.1973 Kopenhaga Esperantista Klubo, Løvetandsvej 31, DK-2700 Brønshøj, Danlando. Sendu al ni saluton. Ni kompensas per bela bildkarto.

Preparu vin por la 58-a en Beogrado! Informiĝu kaj konatiĝu antaŭ via vojaĝo pri popoloj, lingvoj, klimato, turismo ktp. de la kongresaj lando kaj urbo. Studu praktikajn konsilojn kaj ekzercojn utilajn por ĉiu kongresonto. Mendu la kajeron "Preparu vin por la 58-a", pagante 5,00 skr aŭ 5 rpk al Inter – Agadgrupo por Esperanto, Box 55028, S-400 53 Gotenburgo 55, Svedio. Sveda poŝtĉekkonto: 42 66 60 -7.

Urĝe serĉataj: Plena Gramatiko de Esperanto, Volumo I, kaj Enciklopedio de Esperanto, ambaŭ volumoj. Rudolf Helmke, D- 4773 Möhnesee-Günne, Wiesenstrasse 9, F.R. Germanujo.

Oficiala informilo

(daŭrigo de p. 79)

DONACOJ 1973 (Gld.)

Asocia kapitalo: Svislando: heredaĵo f-ino Räz, 440,–. Sumo ĝisnuna: 440,–.

Fondaĵo Canuto: Aŭstralio: H. Behncken, 8,–. Danlando: G. Jørgensen, 0,55. Francujo: R. Lemaire, 31,31. Hungarujo: T. Veszpremi, 9,48. Nederlando: J. Aarse, 5,–. Usono: S. Kimball, 9,68; B.A. Sherwood, 4,16. Anonimulo, 9,59. Sumo ĝisnuna: 319,62.

Kampanjo "100 x 100": (por ke 100 personoj devigu sin donaci ĉiujare dum 3 jaroj ekde 1971 po 100,– gld. aldone al la kutimaj kotizoj kaj donacoj).

Sumo donacita por 1971: 5 300,– gld.
Sumo donacita por 1972: 6 600,– gld.
Sumo ĝis nun por 1973: 3 005,77 gld.

Patrona membro A de TEJO 1973: 13 D.J. Langman, Nov-Zelando.

Propaganda konto: Nederlando: A. Bloemhard, 20,50. Sumo ĝisnuna: 35,82.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo. Universala Esperanto-Asocio

Dek mil libroj disponeblaj!

Dank' al la instalo de moderna kserografia kopiilo en la Domo de UEA en Rotterdam, la tuta riĉaĵo de la Biblioteko Hodler, kun multaj miloj da libroj kaj gazetkolektoj, estas nun atingebla je moderaj prezoj por ĉiuj membroj ĉie ajn en la mondo. Jen nur kelkaj ekzemploj de jam pretaj kaj tuj livereblaj fotokopioj. La Fotokopia Servo de UEA volonte plenumas viajn mendojn pri tiuj aŭ iu ajn alia volumo el sia kolekto. Petu oferton pri specifa verko aŭ petu kompletan liston de la jam pretaj kopioj!

El parnaso de popoloj (Grabowski) 228p	18,70
Verdaj donkiĥotoj (Baghy) 221p 1933	17,95
Mia spektro (Kurzens) 1938 64p poemaro	7,–
Revolucio en la lingvoscienco (Andreev) 68p	7,–
Fajro kuracas (Miĥalski) 38p 1932 poemoj	4,30
De paĝo al paĝo (Totsche) 120p 1932	18,60
Kvin leteroj kaj 1 poŝtkarto de Zamenhof	2,40
Unua libro por rusoj (Zamenhof) 48p 1887	9,30
Unua libro por poloj (Zamenhof) 40p 1887	9,80
Preter la vivo (Baghy) 94p 1931 poemaro	15,–
Vivo de Arnaldo (Mussolini, tr. Kalocsay)	16,20
Metropoliteno (Varankin) 200p 1933 romano	30,60
Meza vortaro int.-germana (Zamenhof) 73p	7,–
Plena vortaro rusa-internacia (Zamenhof)	20,50
The international language (Z., tr. Geoghegan)	7,35

La prezoj estas en guldenoj. Aldoniĝas 10% por la sendokostoj kaj, por Nederlando, 4% por imposto.

HELPU REKLAMI



LA 58-AN
Universalan Kongreson en Beograd, uzante sur viaj korespondaĵoj la allogan dukoloran glumarkon!
Folio po 10 markoj kostas 0,55 gld, afrankite (por Nederlando: 0,60 gld afr).
Mendu ĉe UEA

JUNULARA TENDARO EN KUOPIO, FINNLANDO

Nun aŭ neniam: plenkore ĝuu pri finna naturo, ĉar eblas ĉiutage naĝi, saŭni, malstreĉiĝi en juneca etoso dum tendaro en Tikkalansaari, 7 km-ojn el la centro de Kuopio, 8-12.8.73. Ne kotizo, ne pago por loĝloko. Eblas tendumi liberaere aŭ tranokti en stranda vilao (litoj) por 20 personoj). Vi mem kuiru aŭ aĉetu manĝojn malmultekoste. Programo improviza. Ankaŭ estonta planado pri nova junulara sekcio de EAF. Informojn donas: Junulara Sekcio de "Lingvoponto", PL 119, SF-70101 Kuopio, Finnlando.

44a Itala Kongreso de Esperanto

okazos en Trento, Norda Italujo, en la urbo de la Koncilio

de la 15a ĝis la 22a de septembro 1973

POR EKSTERLANDANOJ LA ALIĜO ESTAS SENPAGA.

La prezoj ne estas altaj. – Por la kongresanoj, la komitato organizos senpagajn aŭtobusekskursojn tra la belega dolomita regiono – inkluzive ankaŭ viziton al Bolzano, tre interesa urbo ĉe la norda landlimo, kies loĝantaro apartenas al la du etnaj grupoj: itala kaj germana.

Petu informojn de "ESPERANTO-GRUPO" – Via Cavour 17 – I-38100 TRENTO (Italujo), kaj mendu loĝejon kiel eble plej baldaŭ, ĉar dum la monato septembro Trento estas vizitata de multaj turistoj.

Helpu la Esperanto-movadon partoprenante multnombre la Italan Kongreson de Esperanto.

El Popola Ĉinio

Esperanta Monata Ilustrita
Specimeno akirebla senpage

ABONTARIFO: 1 jaro £0,50 Kan.$2,00 5,– gld.
2 jaroj £0,75 Kan.$3,00 7,50 gld.
3 jaroj £1,00 Kan.$4,00 10,– gld.

ABONU: Ĉe niaj perantoj en diversaj landoj aŭ rekte ĉe la Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo, P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio



KOLEKTU LA ELDONSERION

ORIENTO - OKCIDENTO

eldonatan sub aŭspicio de UEA

LUKSAJ VOLUMOJ DAŬRE VALORAJ

1. **MALSATA ŜTONO,** sep emociaj rakontoj de la plej glora hinda aŭtoro de modernaj tempoj, Rabindranath Thakur (Tagore). Vive reflektas la socian kaj naturan fonon de Hindujo. El la bengala originalo tradukis L. Sinha. 127 p., 8 ilustraĵoj. Bind. 13,86 gld.
2. **RAKONTOJ DE OOGAI,** kvar diverskarakteraj verkoj de la elstara japana novelisto Mori oogai. Koncizaj noveloj, densaj je dramaj okazaĵoj. Inkluzivas la filmitan "Sansyô-dayû". Kvar malsamaj tradukintoj. 116 p., 2 bildoj. Tolbind. 10,25 gld.
3. **LA NAŬZO,** eksterordinara romano de la franca filozofo-romanisto Jean-Paul Sartre. Intima taglibro de homo, kiu esplorvagas en sia konscio. Bonega traduko de Roger Bernard. Eldono de UEA. 212 p., kun frontispico. Broŝ. 7,50 gld.
4. **KALEVALA,** la grandioza nacia eposo de la finna popolo, plena je mitaj heroaĵoj, praa folkloro, majesta poezio, eĉ humoro. Monumenta, 30-jara traduko de J.E. Leppäkoski, "riĉa rezulto de admirinda fortostreĉo, plena rego super la lingvo, majstra manipulo de formo" (Kalocsay). 368 p., 100 vinjetoj. Bind. 25,– gld. Kun leda dorso 35,– gld.
5. **MARTIN FIERRO,** iasence la nacia eposo de Argentino, liberritma verko de José Hernández. Vigla, facile fluanta stilo gustanta je la senbrida vivo de la gaŭĉo. Rimversa traduko de Ernesto Sonnenfeld. 289 p., ĉirkaŭ 1200 strofoj, ilustrita. Bind. 14,40 gld.
6. **REĜO LEAR,** unu el la ĉefdramoj de Shakespeare. Brile "Shakespeare-a" versa traduko de la majstro de Esperanta poezio, K. Kalocsay, "decida antaŭpaŝo en la kampo de la viva dramo" (Foote). Emocia enhavo plus ĝue legebla lingvaĵo. Eldono de UEA. 160 p. Bind. 12,– gld.; broŝ. 9,– gld.
7. **KVIN VIRINOJ DE AMORO,** de Ihara saikaku, klasikulo de la japana erotika literaturo. Kvin ekzotikaj noveloj, kie la aŭtoro lerte intermiksas tragedion kun humuro, pasion kun satiro. Traduko de Miyamoto masao. 159 p., 42 samepokaj ilustraĵoj. Tolbind. 13,– gld.
8. **LA SPLENO DE PARIZO,** proz-poemaro de la epokfara franca poeto Charles Baudelaire, laŭ sia enhavo komplementa volumo al la glora verko "La floroj de l' malbono". Tradukis Paul Lobut. 125 p., bindita per artefarita ledo, ilustrita. 12,50 gld.
9. **EL LA VIVO DE SYUNKIN,** verkoj de Tanizaki Zyun'itiro (1886-1965), internacie konata japana romanisto-dramisto. Enhavas kvar verkojn: novelojn "El la vivo de Syunkin" kaj "Knaboj" kaj dramojn "Okuni kaj Gohei" kaj "Mumyô kaj Aizen". Tr. Miyamoto masao kaj Isiguro teruhiko. 145 p., ilus. Bind. 14,– gld.; broŝ. 11,– gld.
10. **LA NOBLA KORANO,** granda verko en la araba literaturo. La teksto aperas paralele en la araba kaj Esperanto. Tradukis Italo Chiussi, kontrolis i.a. prof. G. Waringhien. 654 p., bindita per ledeca plasto. 35,– gld.
11. **NEĜA LANDO,** Nobel-premiita romano de Kawabata Yasunari (1899-1972), japana moderna verkisto. Delikatsenta majstroverko pri homaj rilatoj. Tradukis Konisi Gaku. 118p., tolbindita. 14,50 gld.

Krome, eksterordinara eldono en la serio:

LA DIA KOMEDIO, de Dante Alighieri, mondliteratura verko bezonanta nenian prezenton. Traduko de Giovanni Peterlongo kun paralela itallingva originalo. Lukse bindita, 709-paĝa, kun unika kolekto de ilustraĵoj de Botticelli. 43,80 gld.

Aperos baldaŭ pliaj gravaj titoloj

Ĉiuj mendeblaj rekte ĉe la Libroservo de UEA

Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando

Bonvolu aldoni 10% por sendokostoj. Krome, nederlandanoj, pro la enlanda spezimposto, bonvolu aldoni 4% de la netaj prezoj de libroj celitaj al nederlandaj adresoj.